

1986 majo
79a jaro
n-ro 965 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-3535

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Estrara kunsido en la renovigita Domo de UEA



+ faka agado

Vi trovos

la petitan fakan numeron, kies pli fruan aperon grave malhelpis poŝtaj kaj trajnaj strikoj. La laborpremo al redaktoro povas fariĝi nervoziga. Verŝajne tiu de Stefan Maul lastatempe fariĝis troa. Se vi legis *Monato* (4/1986), vi eble vidis plendon, en kiu li nomis la revuon *Esperanto* "minuskla recenz-revuo". La tono amuzas, des pli ke *Monato* plu vivas dank' al prizorgo de GCA. Maul plendas, ke UEA ne rapide sendis al li informojn pri la ŝanĝoj en la LKK por la 72a UK (vd. p.81), do oni nun ignoru redakciajn anoncojn de *Monato* pro tiu, kiu insistas, ke oni "Ne sendu... raportojn pri la Esperanto-movado"! Nu, rapideco ne helpas al ĝusteco, kiel scias respondeca redakcio. *Esperanto* ne estas bulvarda gazeto de insultoj kaj ŝajnaj sensacioj. Se aliaj gazetoj – i.a. tiuj kun politikaj horizontoj – misprezentas, la historio ilin juĝos, sed UEA estas neŭtrala, kaj ĝia oficiala organo provas unuavice esti respondeca. Tion nia legantaro atendas, ĉu ne?

Enhavo

- 81 **Estrara kunsido:** Preparoj por Varsovio progresas tre bone (Simo Milojević)
- 82 **Scienca Akademio Comenius:** Altnivela internacia scienc-akademio fondita (Paul Neergaard);
Osmo Buller, nova direktoro de la Centra Officejo
- 83 **Terminologio:** Faka apliko kaj terminologio en Esperanto: Ĉu hobiaj aŭ seriozaĵoj? (Wera Dehler)
- 85 **Nekrologoj:** Teo Jung, Veselin Damjanov, Srdjan Flego
- 87 **Instruado:** Lernenda profesiigo: Pedagogia antaŭvento sojle de la dua jarcento (István Szerdahelyi)
- 88 **Filozofio:** Al nova filozofia tradicio (Evaldo Pauli)
- 89 **Aŭtistoj:** Aŭta fakvortaro;
Vegetarismo: Fakkongresa informado (Christopher Fettes)
- 90 **Muziko:** Internacia Esperanto-Horo (Dimitr Terziev)
- 91 **Filatelo:** Premiitaj ekspoziciaĵoj (Rudolf Burmeister);
Tradukado: Formiĝas internacia reto por komerca tradukado (Claude Bodson)
- 92 **Fervojistoj:** Vigla informa, terminara kaj kultura agadoj (Joa-chim Giessner)
- 93 **Filologio:** Opiniforma potencialo (Violin Oljanov)
- 94 **Skoltado:** Eblecoj estas grandaj (J.K. Hammer)
- 95 Internacia Jaro de Paco: MEM en Volgogrado (Umeda Yosimi)
- 96 **Kongresa komuniko** (novaĵoj pri la 71a Universala Kongreso);
Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 98 **Loke – Fake – Persone** (mallongaj novaĵoj)
- 100 **Anoncetoj; Nekrologoj**

La kovrilo

montras du aspektojn de la renovigita Centra Officejo, alinomata la Domo de UEA. La fasado ricevis lavadon, kaj oni povas vidi tra la ĉetrotuaraj montrofenestroj la tutan Libroservon, kiu nun estas unu el la plej grandaj kaj modernaj en la mondo. La Domo havas bele grandan vitran pordon kun impona enirejo, el kiu oni nun povas rekte enpaŝi la ĉambron de la Libroservo. (Fotis Z. Ivanoski.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39;

Telekso: 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterkovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 42 37 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

95/1343/d

Preparoj por Varsovio progresas tre bone

La kunsido de la 19a ĝis la 21a de aprilo, kiu okazis en la Centra Oficejo en Roterdamo, estis fakte la lasta labora kunveno de la nuna Estraro de UEA. Ĝi ja kunsidos ankoraŭ komence de la Universala Kongreso en Pekino, sed tiam sur ĝia tagordo troviĝos nur la necesaj formalaj kaj teknikaj antaŭ ol pludoni la torĉon al nova estraro, elektota en Pekino. Pro la statuta nereelekteblo de la nuna prezidanto, pro jam anoncitaj decidoj ne rekandidati (i.a. Corsetti kaj Ragnarsson) kaj pro nekonfirmitaj informoj pri novaj kandidatiĝoj – la Asocio dum la venontaj tri jaroj efektive havos novan estraron. Konvenas ja, ke oni ĝuste tiel eniru la novan jarcenton de Esperanto.

Por oficisto, kiu observis la estraran kunsidon (en kiu cetere mankis s-ro Ragnarsson), du okazintaĵoj markas la ĵusan kunvenon. Ili ambaŭ estis eksterkunsidaj, unu en la komenco, la alia en la fino de la tritaga periodo. Jen pri kio temis:

En ĉeesto de plurdeko da invititoj, movadaj kaj ekstermovadaj, la 18an de aprilo okazis oficiala inaŭguro de la vastigita kaj renovigita Domo de UEA en Roterdamo. Ne nur la gastoj sed ankaŭ pluraj estraranoj vere surpriziĝis pri la novaj ekstera kaj interna aspektoj de la Domo. Ni nun havas centre de la mond-havena Roterdamo sidejon, komfortan kaj modernan, dignan kaj reprezentan. La aspekto de la Domo

Foto: Z. Ivanoski



La nova, digne moderna ĉambro de la Libroservo de UEA dum la oficiala malfermo la 18an de aprilo.

ne plu pensigas, ke Esperanto estas centjara historiaĵo, sed ke ĝi staras antaŭ nova jarcento, kiun ni povus fari ĝia. La Domo de UEA nun efektive estas vidinda kaj vizitenda.

Tiu alia okazintaĵo, kiu markis la ĵusan kunsidon, estis la decido, ke la Estraro fintraktu sian ampleksan tagordon en du tagoj, kaj ke ĝi dum la tria planita kunsidotago – simple helpu al la laboroj de la Centra Oficejo. Tiel almenaŭ dum unu tago la laborkapacito de la Oficejo preskaŭ duobliĝis, kaj la oficistoj kun la estraranoj sukcesis fari veran amason da laboro. Se ŝerci decus, ni en la Oficejo preferus, ke la estrarkunsidoj tute ne okazadu, sed ke la estraranoj du- aŭ trifoje jare venu al la CO kaj kunhelpu en la laboro.

Tamen, kion la Estraro faris dum la du kunsidaj tagoj, kion ĝi traktis, kiaj decidoj surtabliĝis?

La Universalaj Kongresoj estis unu el la ĉeftemoj. Estis konstatite – kun surprizo –, ke la financa saldado de la sukcesa Kongreso pasintjare en Aŭgsburgo ankoraŭ ne eblas pro manko de informoj el la kongresurbo. La ĉi-jara Kongreso en Pekino preskaŭ konfuzas pro la senĉesa alfluo de novaj aliĝoj, tiel ke ĝi jam certas pri la loko de la plej granda ekstereŭropa UK en la tuta tempoflugo de post Bulonjo. Aliajn decidojn pri Pekino vi trovos en la Kongresa Komunikado en ĉi tiu numero.

La jubilejara Kongreso en Varsovio, de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1987, okupis apartan atenton de la Estraro. Tiucele la komencon de la kunsido ĉeestis ankaŭ s-ro S. Świstak, reprezentanto de Pola Esperanto-Asocio. La Estraro konstatis, ke la preparoj por la centra priĝesto de la Centjara Jubileo de Esperanto – en ties patrujo – tre bone progresas malgraŭ la diversaj ŝanĝoj en la gvidaj organoj de PEA mem. Cetere, tiujn ŝanĝojn la Estraro konsideras interna afero de PEA, kiu, estante la plej granda kaj la plej forta landa Esperanto-organizaĵo, kapablas mem solvi siajn eventualajn problemojn. Pro la enscenigo de kolektiva ekziĝo de la antaŭe nomita LKK (antaŭ ol ĝi efektive sukcesis eklabori), la Estraro nomis novan Lokan Kongresan Komitaton, kiu konsistas i.a. el Świstak, Pettyn, Wesołowski, Staszczak, Pieńkiewicz kaj M. Dobrzyński – ĉiuj internacie konataj kaj elstaraj aktivuloj, kiuj mankis en la antaŭa, nun ekziĝinta LKK.

Ni eluzu ĉi tiun okazon por emfazi, ke la jubilejara Kongreso estos en Pollando ne por apogi tiun aŭ alian movadan aŭ ekstermovadan estraron aŭ partion. Ni iros tien por apogi la polan esperantistaron, por riverenci antaŭ la tombo de Zamenhof, por ĉekskurse pilgrimi al Bjalistoko. Ni kongresos en Varsovio, ĉar ĝi estas la lulilo, la naskiĝloko de niaj lingvo kaj movado, ĉar la naskiĝlokoj ne estas io elektelebla, sed

io definitive donita, io kio estas kaj restas. Ni simple ŝuldas nian Centjaran Jubileon al la pola grundo kaj ni iros tien por tuŝi ĝin kun pietato.

Pliaj detaloj pri la Kongreso en **Varsovio**: funkciulo de UEA estis en Varsovio komence de majo, por definitivigi kun PEA, Palaco de Kulturo kaj Scienco (kongresejo), vojaĝagentejo Orbis kaj la pola flugkompanio LOT la necesajn kontraktojn pri kunlaboro; la **baza kotizo** por aliĝi al la Kongreso estos 160 gld. (ĉiuj landoj sen pagaj malfacilaĵoj), 70 gld. (orienteŭropaj kaj triamondaj landoj), 60 gld. (polaj partoprenantoj). Venontjare en Pollando okazos ankaŭ la kongresoj aŭ konferencoj de TEJO (junularo), IFEF (fervojistoj), ILEI (instruistoj), UMEA (medicinistoj), LIBE (blinduloj), MEM (pacmovado) kaj Freinet-pedagogoj. PEA anoncas, ke oni faras klopodojn okazigi en Pollando ankaŭ Ekumenan Esperanto-Kongreson, dum UEA faras sian eblon, por ke ankaŭ Sennacieca Asocio Tutmonda povu realigi sian deziron kongresi en Pollando dum la Jubilea Jaro.

La financo kaj administrado de la Asocio havis sian regule gravan lokon ankaŭ en ĉi tiu kunsido. Kvankam oni faris ekstreme grandan klopodon pri ŝparoj – kaj efektive ŝparis ĉ. 90 000 guldenojn ĉe la kostoj –, pro la fakto, ke la buĝetitaj rimedoj ne realiĝis (ĉefe ĉe Grafika Centro Antverpeno kaj ĉe Turismo), la negativa saldo de 1985 estas 93 500 gld. Tamen, se oni kompare analizos la bilancon kaj la spezokonton por 1985, eblus konstati, ke la kapitalo malkreskis dum la jaro je malpli ol 40 000 gld. kaj tio estas la reala deficitito.


Osmo Buller, 35-jara finno, kiu venis al la CO meze de la pasinta jaro, estas nomita direktoro de la CO. Tiu posteno vakis de aprilo 1985, kiam ĉesis okupi ĝin Stefan MacGill, kiu meze de februaro ĉijare forlasis Roterdamon kaj ekloĝis en Budapeŝto. La laborpremo de la CO estas nun eksterordinare granda ne nur pro la manko de sufiĉaj laborantoj, sed ankaŭ pro la komplikeco aŭ grandeco de kelkaj nun traktataj kongresoj (Pekino, Varsovio, Abiĝano). Tamen, estas jam prenita decido pri kelkaj novaj dungoj, plentempaj aŭ provizoraj, kaj la Estraro supozas, ke la ĉi-rilataj problemoj baldaŭ estos venkitaj. Multe helpas la fakto, ke la rekonstruaj laboroj en la asocia sidejo jam komplete finiĝis.

La Estraro pridiskutis ankaŭ la diversajn aspektojn de la preparoj por la Jubileo, aparte pri la libroserio Jubilea Kolekto "Jarciento de Esperanto", al kiu nun aldoniĝos la plej fama el la esearoj de Waringhien – *Lingvo kaj vivo*. La manuskripto de la antologio de Esperanto-prozo atingis la Oficejon kelkajn tagojn antaŭ la kunsido. Baldaŭ aperos popularscienca verko *Vetero kaj klimato de la mondo* (nun kompostata). En Pekino oni lanĉos la verkon *Poemaro pri paco*, omaĝe al Internacia Jaro de Paco – 1986.

SCIENCA AKADEMIO COMENIUS

Altnivela internacia scienc-akademio fondita

La 12an de aprilo fondiĝis en Kopenhago Internacia Scienca Akademio Comenius, konforme al severaj elektoprincipoj, similaj al tiuj aplikataj en la konvenciaj naciaj sciencakademioj. Laŭ la statuto de



● **Osmo Buller**, la nova direktoro de la *Centra Oficejo*, eklaboris ĉe UEA en julio pasintjare okupiĝante i.a. pri kongresaj taskoj. Li diplomigis pri ekonomiko kaj filozofio en Universitato de Oulu, kaj en tiu nordfinnlanda urbo li gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj prezidis la lokan societon. Buller estis kunredaktoro de *Esperanta Finnlando* kaj li kontribuis ankaŭ al la edukministeria laborgrupo pri Esperanto (vd. *Esperanto*, p.101/1984). Antaŭ ol veni al UEA, li laboris en asocio por plenkreskula edukado.

Ni finu ĉi tiun skizan raporton per informo, kiu ĝojigis ankaŭ la estraranojn: la individua membraro de UEA, kiu en 1985 kreskis je kelkaj centoj, daŭrigas kreski ankaŭ en la unuaj monatoj de 1986.

Simo Milojević

la nova Akademio, minimume 60% el ĝiaj membroj devas jam esti membroj de nacia scienca akademio, dum maksimume 40% konsistos el aliaj aparte elstaraj sciencistoj.

La nombro de Fondaj Membroj de la nova Akademio estas 28 je la dato de skribo de ĉi tiu artikolo. El ili 21, do tri kvaronoj, estas anoj de naciaj akademioj. La jenaj landoj estas reprezentitaj (du nombroj indikitaj: nombro de naciaj akademianoj + nombro de aliaj elstaraj sciencistoj): Belgio (1 + 0), Britio (2 + 0), Bulgario (2 + 2), Ĉeĥoslovakio (1 + 0), PR Ĉinio (1 + 0), Danlando (2 + 0), Francio (0 + 1), FR Germanio (0 + 1), Hispanio (2 + 0), Italio (2 + 1), Japanio (1 + 0), Jugoslavio (1 + 1), Nederlando (1 + 0), Norvegio (2 + 0), Rumanio (0 + 1), Sovetunio (2 + 0) kaj Svedio (1 + 0), do 28 Comenius-akademianoj el 17 landoj.

Ni ankoraŭ atendas respondojn de aliaj sciencistoj, invititaj aliĝi. Plie, ni ankoraŭ ne sukcesis kontakti kvin anojn de naciaj sciencaj akademioj, kiuj scipovas Esperanton. La subskribinto dankos pro informoj pri scienc-akademioj elekteblaj por la nova Akademio.

La ĉefa **celo** estas prosperigi Esperanton per praktika uzado de la lingvo en la sciencoj. La unua tasko de la Akademio estas publikigi jarlibron sub la nomo *Aktoj de Akademio Comenius*. Ĝi enhavos la statuton, regularon, adresaron de la membroj kaj, amplekse laŭ financaj ebloj, raportojn en la Internacia Lingvo (kun nacilingvaj resumoj) de la akademianoj kaj de aliaj alte kompetentaj sciencistoj, do eldonaĵo iom simila al la siatempa *Sciencaj studoj*.

La Akademio starigos laŭ la ebloj kunordigon kun aliaj sciencaj akademioj kaj institucioj naciaj kaj internaciaj. Ĝi kunlaboros kun la libera universitata projekto Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, kaj espereble kun Esperanto-Asocio Teknikista-Sciencista sub Ĉina Akademio de Sciencoj.

La **financado** de Akademio Comenius estas la plej tikla problemo. La financan (materian) bazon formas, laŭ la statuto, la kapitalo, la ĉiujaraj enspezoj kaj la fondaĵoj. Plue laŭ la statuto: La kapitalo konsistas el heredaĵoj kaj kontribuoj de minimume 10 mil svisaj frankoj aŭ ekvivalento en aliaj liberaj valutoj. La kapitalo estas netuŝebla. La ĉiujaraj enspezoj konsistas el interezoj de la investita kapitalo kaj el regulaj kontribuaĵoj, ĉiu en alteco de minimume cent svisaj frankoj aŭ ekvivalento.

La plej urĝaj unuaj elspezoj estas kovritaj per donacoj de kelkaj el la novaj akademianoj, sed por ekfunkciigi la Akademion fakte estos ja necesa la apogo de bonvolaj mecenatoj, kiuj ĉiujare pagos minimume ekvivalenton de cent svisaj frankoj. Ni esperas, ke la venontaj monatoj montros kuraĝigajn rezultojn. Konsentojn pri kontribuoj oni afable sciigu provizore al la subskribinto, pli poste estos dissendi-

taj informoj pri pagmaniero kaj pagadreso. La sukceso de ĉi tiu prestiĝa Akademio dependos, evidente, unuavice de la akcepto kaj helpo de esperantistaj individuoj kaj organizaĵoj.

La **provizora estraro** konsistas el profesoroj Paul Neergaard (prez., Gothersgade 158, DK-1123 København K., Danlando) Stojan Ĝuĝev kaj Ivo Lapenna (vicprez-oj), Christer Kiselman (sekr.), Paul Kustaanheimo (kasisto), S.D. Nisbet kaj Olav Reiersøl (ceteraj membroj). La jura sidejo estos en Uppsala, Svedio, kaj oni aranĝas juran personecon.

Paul Neergaard

TERMINOLOGIO

Faka apliko kaj terminologio en Esperanto: Ĉu hobio aŭ seriozaĵo?

Jen la unua artikolo en serio pri la escepte grava temo de la fakvortaro. En siaj sekvaj artikoloj Wera Dehler (Germana DR) traktos la nunan staton de la postlasaĵo de Wüster, Drezen k.a. kaj la internacian terminologi-normigan movadon. En la tria artikolo ŝi intencas prezenti la preparlaborojn por Terminologia Esperanto-Centro.

Lingvo literatura aŭ scienca?

Esperanto, internacia lingvo planita kaj iniciatita de Zamenhof, dum la unua jarcento de sia ekzisto evoluis ĉefe dank' al sia beletro, traduka kaj originala. Ĉu el tiu fakto ni konkludu, ke ĝi estas esprimilo prefere por poeziaĵoj, destinita pli por priskribi sentojn kaj emociojn kaj malpli taŭga por komuniki teknikajn precizaĵojn? Nepre ne, eĉ male: la lingva strukturo de Esperanto, ĝia sistemeco kaj (relativa) racieco legitimas ĝin kiel speciale taŭgan por sciencaj kaj teknikaj (unuavorte: fakaj) celoj.

Kial tamen tiu lingvo estas evidente subevoluinta rilate al faka leksiko, dum floradas ĝia poezio kaj novelaro? La respondo eble estas komplika, sed certe ne kulpas la lingvo mem!

Faka apliko aŭ terminologio?

Kion fari por evoluigi la subevoluintan fakvortaron de Esperanto? Multaj pledas por la vojo, kiu tradicie en etnaj lingvoj gvidis al la ekesto de faklingvoj: unue verki pri fakaj temoj kaj poste kolekti la fakajn vortojn (aŭ terminojn) kaj kompili terminarojn.

Aliaj opinias, ke ne eblas fake verki sen disponi pri terminaroj, ke oni unue devas krei tiujn helpilojn, por poste apliki ilin en la praktiko.

Ĉu temas do pri la eterna problemo „kokino kaj ovo”? Eble ne. Mi preferus diri: temas pri la du flankoj de la sama medalo, ne disigeblaj unu de la alia. Kaj la solvon de la dilemo ni eble trovos en iu ‘samtempe’: la minimumo estas, ke aŭtoroj en glosaroj listigu (kun precizaj difinoj) la novajn vortojn uzitajn en iliaj verkoj; la dezirinda maksimumo estas, ke specialistoj samtempe internacie kunlaboru pri terminaroj kaj (bazaj, enkondukaj) fakaj verkoj. Almenaŭ, okupiĝu pri kompilado, sistemigo kaj ‘kreado’ de terminoj nur tiuj homoj, kiuj kapablas senerare apliki kaj elprovi ilin en faka kunteksto.

Libera evoluo aŭ konscia reguligo?

Ankaŭ pri la demando pri libera evoluo aŭ konscia reguligo ekzistas diversaj opinioj. Iuj diras: lasu la homojn verki laŭvole, lasu ilin krei la terminojn, kiujn ili bezonas — se ekestas per tio pluraj vortoj por la sama afero, ne gravas: la praktiko venkigos la plej taŭgan! Aliaj protestas: tio signifas anarkion, kaoson — oni devas konscie reguligi almenaŭ la fakan lingvon. Terminoj estu la rezulto de normigo — faka diskuto ne eblas, se ĉiu partoprenanto uzas alian vorton por la sama afero aŭ komprenas sub la sama vorto ion alian!

Kiuj pravas? Ni ĵetu rigardon al etnolingva tereno: kiel progresas aliaj lingvoj rilate al siaj fakaj esprimoj?

Konsidere la fakton, ke la nombro de specialaj vortoj en unuopaj fakoj estas multoble pli granda ol en la ĝeneralaj vortaroj kaj plue saltrapide kreskas, „libera evoluo” ne plu eblas, ĉar ĝi simple signifus rezignon pri interkompreniĝo. Aliflanke, dum ŝtorma evoluo de scienc-teknika revolucio la racie-trankvila laboro de sistemigo kaj reguligo estas tre komplika, kaj plena sukceso en normigado de terminoj apenaŭ eblas. Sed ”plena normigado” eĉ ne necesas, aŭ, ni diru, eĉ ne dezirindas. Speciale en sociaj sciencoj, kie konceptoj de lando al lando, ofte eĉ de homo al homo, diverĝas, verŝajne ne eblas egaligi ĉiujn signifojn kaj kromsignifojn de iu vorto, sen difekti la specialaĵojn de diversaj ‘skoloj’. Kaj en teknikaj fakoj nek eblas, nek necesas, fiksi ĉiujn terminojn ĝis la lasta derivaĵo, ĉar la disvolviĝo de novaj realaĵoj kutime okazas pli rapide ol la normiga procedo.

Kie do estu la limoj inter normigo, reguligo, rekomendo kaj libereco? Tion devos pripensi, pri-diskuti kaj decidi la koncernaj specialistoj en ĉiu aparta kazo. Gvida principo ĉi-rilate estas — same por etnaj kiel por planaj lingvoj — “neceso kaj sufiĉo”.

Pompa organizaĵo aŭ produktado de terminoj?

En la plimulto de scienc-teknike progresemaĵoj landoj ekzistas naciaj norm-komitatoj, kiuj i.a. zor-

gas pri la normigo de terminoj. Ili estas oficialaj, ŝtataj institucioj kun dekoj da plenoficaj kaj miloj da honoroficaj kunlaborantoj, kiuj troviĝas en daŭra vetkurado kontraŭ la tempo, des pli se ili respond-ecis pri lingvo malpli evoluinta rilate scienc-teknikon.

Se temas pri transnacia interkompreniĝo, pri komparo kaj akordigo de nocio-sistemoj, pri internaciigo de terminoj — ne malhavebla en ekonomie integriĝanta mondo — tiam la problemoj akriĝas kaj solvoj nur pene atingeblas. Tamen tiuj institucioj estas bezonataj por iel regi la sekvojn de scio-eksplodo kaj inform-inundo.

Sed en la Esperanto-movado konserviĝas la opinio, ke sufiĉas la produktado de terminaroj — laŭeble amase — kaj ĉio estas en ordo! Kia estas la nuna situacio?

Ĉiu esperantisto — senkonsidere lian kompetenton — povas kompili fakvortaron, ‘krei’ terminojn laŭplaĉe kaj, se li havas aŭ akiras sufiĉe da mono, eldoni serioz-aspektajn librojn kun pompaj titoloj. Se li opinias tion utila, unuopulo povas eĉ proprapotence klasifi tiaĵon kiel „normon” — kaj neniu malhelpas lin! Per allaso de tiaj amatoraĵoj ni ridindigas Esperanton kaj subfosas la laborrezultojn de niaj plej eminentaj aktivuloj, kiuj klopodas seriozigi kaj plibonigi niajn ‘eksterajn rilatojn’. Tiel ni ne povos daŭrigi, se ni vere pretendas por Esperanto samrajtan lokon inter aliaj lingvoj, se ni volas proponi ĝin kiel taŭgan interkomprenilon ne nur por turistoj, sed ankaŭ por sciencistoj.

Sed kion fari? La Esperanto-movado ne estas ŝtato kun jura kaj materia potenco, kiu povas postuli, preskribi aŭ malpermesi ion. Ĝi ne estas riĉa firmao, kiu povus fondi esplor-instituton kaj dungi dekojn da homoj. Ni havas nur niajn proprajn fortojn — sufiĉe malfortajn —, sed saĝe utiligante ilin, ni povus per kunlaboro fortigi tiujn fortojn kaj krei institucion, kiu funkcius kompareble al scienc-teknikaj norm-institutoj por etnaj lingvoj. Koncerne amplekson, strukturon kaj laborprincipojn de tia institucio, same validas la jam citita principo de „sufiĉo kaj neceso”.

Faka lingvo nur por fakuloj?

Ĉu la plua evoluado de fakaj vortoj en Esperanto estas problemo, kiu interesas kaj koncernas nur la specialistojn?

Se ni konsideras, ke fakaj lingvoj, malgraŭ ĉiuj diferencoj, tamen estas partoj de la lingva tuto, ke la limoj inter terminaro kaj ĝenerala vortaro estas fluaj, ne strikte fikseblaj, kaj ke almenaŭ la plej ĉiutagaj terminoj devas enesti eĉ la plej mallarĝan poŝvortaron, tiam la respondo estas klara: bonkvalitaj terminoj kaj la zorgo pri ilia estiĝo estas principe en la intereso de ĉiuj esperantistoj.

Specialan intereson kaj respondecon nature havas la aktivuloj, kiuj devas respondi la demandojn de novbakitaj esperantistoj: Kiel mi povos utiligi miajn lingvosciojn? Ĉu ekzistas faka literaturo? Kie troveblas altnivela terminaro? La aktivuloj povas multe helpi por vekti la konscion pri koncernaj problemoj kaj subteni la strebojn por solvi ilin.

Kaj aparte gravan rolon povos ludi la Esperanto-instruistoj kaj -instruantoj, se ili ne nur instruas la lingvon, sed peras ankaŭ sciojn pri la historio, literaturo kaj perspektivoj de la Internacia Lingvo. La diversaj aspektoj de faka lingvo kaj ĝia racia evoluigo povas kaj devas fariĝi temo de instruado. Konklude ni diru, ke terminologio principe rilatas nin ĉiujn!

La rezolucio

Pro tio por ni ĉiuj estas ĝojige, ke UEA dum la 70a UK en Aŭgsburgo faris gravan decidon por antaŭenpuŝi la terminologian normigadon en Esperanto. La Komitato akceptis rezolucion, preparitan de la Komisiono pri Faka Agado, kiu en sia esenca parto tekstas jene:

1. Konsiderante:

- ke la scienc-teknika revolucio stimulas impete la evoluon de la faka lingvo,
- ke por la estonta pozicio de Esperanto en la

mondo de fundamenta graveco estas ĝia altkvalita apliko en scienco kaj tekniko,

— ke tiu faklingva apliko de Esperanto en la postulenda kvalito nur eblas, se la terminologio respondas al la necesa nivelo kaj ke diletanteco kaj hazardeco de terminologia laboro grave endanĝerigas tiun kvaliton,

2. La Komitato rekomendas, ke oni en la jaro 1987 fondu Esperantan termino-normigan instituton kun la ĉefaj celoj: (a) plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron, (b) reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj (ISO, Infoterm k.s.),

3. La Komitato rekomendas, ke ĝi komisiu la Terminologian Sekcion de UEA (ĝis nun ligitan al la Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto) kunlabore kun kompetentaj esperantistaj institucioj (Akademio de Esperanto, ISAE, CED, fakaj asocioj k.s.) trovi la kompetentajn homojn, prepari la necesajn dokumentojn kaj entrepreni aliajn necesajn paŝojn por ebligi la fondon de tiu Esperanta termino-normiga instituto,

4. La Komitato proponas establi la Fondaĵon Wüster (fondaĵo terminologio) por certigi la necesajn financajn rimedojn por terminologiaj aktivadoj.

Tiu rezolucio donis al la Esperanto-Movado novan ŝancon. Kiel ni utiligos ĝin?

Wera Dehler

NEKROLOGOJ

Teo Jung 1892-1986

La 12an de majo forpasis Teo Jung en Hago, Nederlando. Li estis la dojeno de esperantistaj ĵurnalis-



Teo Jung (maldekstre), s-ino Jung kaj d-ro Victor Sadler dum interparolo en la jaro 1972.

toj, laborinte dum jardekoj kiel esperantista ĵurnalistoj, prozisto, tradukisto, presisto kaj eldonisto.

Teo Jung naskiĝis en Meckenheim (Germanio) kaj pro malriĉeco devis rezigni pluan gimnazian studadon. Li eklernis Esperanton en 1909, poste fondis du grupojn kaj gvidis kursojn. En 1919 li kun aliaj restarigis Rejnlandan-Vestfalian Esperanto-Ligon kaj ekeldonis la monatan organon de la ligo *Progreso*. Kun granda kuraĝo Jung elektis en 1920 Esperanton kiel profesion. La postan jaron sekvis fondo de semajna ĵurnalo, *Esperanto triumfonta* – sendependa, neŭtrala informilo por la Esperanto-movado – eldonata kaj redaktata de Jung. En 1925 oni ŝanĝis ĝian titolon al *Heroldo de Esperanto*. Tuj sukcesa, la gazeto helpis revigligi la enlandan kaj internacian Esperanto-movadon. Jung skribe batalis por kunlaboro, unue inter anoj de diversaj lingvoprojektoj, poste inter anoj de la Esperanto-movado kaj por unueca kaj plilarĝigita UEA. Dum pluraj jaroj la gazeto aperis semajne. Poste, en 1936, la redaktejo estis movita al Scheveningen (Nederlando), sed en 1940 devis ĉesigi sian laboron pro la nazia okupacio de Nederlando. De 1920 ĝis 1961 Jung produktis 1 300

numerojn de la gazeto. Li verkis multnombrajn artikolojn, poemojn, skizojn kaj rakontojn ankaŭ en multaj aliaj Esperantaj gazetoj. Inter liaj verkoj estas *Lando de l' fantazio* (romano kun utopieca temo, 1927), *Sakuntala* (postrakonto, 1927), *Mil kaj unu noktoj* (postrakonto, 1927), *Gudrun* (parafrazo de la antikva germana eposo, 1928), *De Muheddin ĝis Mundilatin*; *Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj* (1937). En 1929 aperis la traduko de Jung kaj aliaj *En Okcidento nenio nova* de Erich Maria Remarque. Jung verkis ankaŭ plurajn traktaĵojn pri konjugaciaj demandoj en Esperanto kaj kunaŭtoris lernilojn por germanlingvanoj.


Esperanto en perspektivo skribas: "Lia lingvo estas zorge flegata, kun altaj lirikaj pretendoj: li sukcesis evoluigi propran stilon, kiu tamen esence dependas de la budapeŝta literatura revolucio. Liaj poemoj aperis en *La alta kanto de la amo* (poemo bazita sur legendo, 1926, 2a eld. 1928) kaj en la poemaro *Ek al batal'* (1935)."

Jung verkis sian monumentan biografion (398-paĝan) en Esperanto: *Ĉiu ĉiun* (1979). Li estis Honora Membro de UEA kaj restis ĝis sia morto vicdelegito de UEA en Scheveningen.

Veselin Damjanov

Veselin Damjanov (1925-1986) forpasis meze de aprilo en Bulgario. Li estis vaste konata tra la mondo kiel profesia kantisto, kiu ofte aperis antaŭ la esperantista publiko. Li estis profesoro pri kantado en Duonsupera Faklo pri Estrada Muziko ĉe Bulgara Ŝtata Konservatorio.

Kantisto ekde sia infanaĝo, Damjanov jam kiel junulo ricevis multajn honorojn. En 1955 li estiĝis solisto de Ŝtata Muzikteatro "Stefan Makedonski" (Sofio), kie li kantis pli ol 30 jarojn. Dum la opersezono 1966-67 li estis kantisto en Ŝtata Opero de Liono (Francio). Ĝis 1985 li donis jam ĉirkaŭ 1 360 koncertojn. En *La reĝino de Ĉardaŝo* li kantis 208 fojojn!



Pro sia artista agado Damjanov ricevis la honoran titolon "merita artisto", dufoje la ordenon "Kiril i Metodij" unuagradan kaj medalojn.

Li prezentis en Esperanto unufoje en la 59a Universal Kongreso en Hamburgo, kie li fariĝis entuziasma adepto de la lingvo. Malfacila tasko estis esperantigi lian tre riĉan repertuaron de diversnaciaj kantoj. Damjanov partoprenis dek Universalajn Kongresojn kaj multfoje turneis por Esperanto. Ĉiam kaj ĉie liaj koncertoj vekis viglan intereson pri la Internacia Lingvo.

Al lia populareco kontribuis ankaŭ liaj gramofondiskoj en Esperanto. Li aŭtoris dudekon da kantoj laŭ originalaj tekstoj de Esperanto-poetoj. Krome Damjanov dufoje partoprenis prezentadojn de Bulgara Esperanto-Teatro kiel rolulo.


La 20an de novembro 1985 okazis en Sofio solena koncerto de Damjanov okaze de lia 60-jariĝo. Pro lia grava kontribuo al la disvastigo de la Internacia Lingvo, Bulgara Esperantista Asocio donis al Damjanov sian plej altan distingon.

Srdjan Flego

Srdjan Flego (1920-1986) mortis la 13an de aprilo en Parizo. Li lernis Esperanton ĉe Akademia Esperanto-Klubo (Zagrebo) en 1938. Flego ricevis diplomon pri aktora arto en 1942 kaj fariĝis membro de Kroatia Nacia Teatro (Zagrebo). Dum la Dua Mondmilito li aktoris en partizana teatro, kaj poste estis membro de Zagreba Teatro ĝis 1947, kiam li transloĝiĝis al Parizo.

En 1957 li fondis Internacian Artan Teatron (IAT), kiu sub lia gvidado prezentis en Universalaj Kongresoj abundan repertuaron dum tre multaj jaroj sinsekve ekde la UK en Marsejlo (1957). Tiu lia gvidado kaj reĝisorado estis elstara kontribuo al la profesiigo de la Esperanta teatra arto. Li mem tradukis tre multajn teatraĵojn por IAT el diversaj lingvoj.

Flego estis unu el la ĉefrolantoj en la Esperanta filmo *Angoroj* (1965).



Lernenda profesiiĝo: Pedagogia antaŭvento sojle de la dua jarcento

En la sama momento, kiam finiĝas la unua jarcento de la Internacia Lingvo, komenciĝas la dua. La nunaj eventoj finas la unuan kaj samtempe antaŭsignalas la duan. Ĉi-sube mi provos konkludi el tri diversaj aranĝoj ion, kio povas esti instrua por la estonteco.

En **Gresiljono** (Grésillon) okazis de la 29a de marto ĝis la 2a de aprilo *Pedagogia Seminario de Unuiĝo Franca por Esperanto*. Ĝia medio estis ideala: ĉio – loĝejo, manĝaĵo, prelegejo, konversaciejo – estis samloke. Tio provizis per eksterordinare grava ebleco transformi dum kelkaj horoj la heterogenan anaron al amika kolegaro: antaŭkondiĉo de bonetosa, sukcesa kunlaboro.

Programo: 8h30 matenmanĝo, 9-10h15 kaj 10h30-12h prelegoj, 12h30 tagmanĝo, 14-17h seminario, ĝis 19h30 libertempo (promenado, ekskurso ks.), 19h30 vespermanĝo, 21h kultura programo. Sabate vespere: interkonatiĝo. Dimanĉe: prelego de Emmanuel Companys (Universitato de Parizo VIII – Vincennes-Saint Denis): *La ĝenerala metodiko de la fremdlingva instruado*: Interesa kaj tre originala paralelo inter la lingvistikaj kaj lingvodidaktikaj konceptoj; didaktika komparologio: interfero, transferoj; specifaj problemoj de francoj en la lernado de fremdaj lingvoj.

Lunde: István Szerdahelyi (Universitato ELTE, Budapeŝto): *Apliko de ĝeneralaj metodikaj konceptoj al la instruado de Esperanto*: Celo kaj motivo; segmentado de lingva materialo; faktoroj difinantaj la metodon; la kvar bazaj kapabloj: rimed- kaj celkarakteraj; instrumentodaj procedoj kaj artifiko; ekzerco tipoj; eksterklasa aktivado: aplikado kaj praktiko.

Marde: instrupraktika seminario, gvidata de s-ino Renée Triolle. La problemo de instruantoj en la instruado de la Internacia Lingvo. Eksterordinare altnivela kaj vigla diskuto: la instruantoj montris siajn metodojn, demonstrilojn kaj modernan instruteknikon. Dum la diskuto unu post alia aperis la problemoj de la francoj en la instruado kaj lernado de Esperanto. La diskuto kirliĝis ĉirkaŭ pedagogiaj, metodikaj, soci- kaj psikolingvistikaj problemoj. Dank' al la vere profesia diskutgvidado de ĝisosta praktika lingvopedagogio, la problemoj klariĝis kaj per sperto-interŝanĝo multaj solviĝis.

Dum la posttagmezaj seminarioj la antaŭtagmezan materialon oni prilaboris, kaj transmetis la teo-

rion en la praktikon. La vesperaj kulturprogramoj – krom la malstreĉiĝo – kontribuis ankaŭ al la parol-evoluigo. Tre interesan, aktualan kaj modernan metodon por informi la vastan publikon pri Esperanto prezentis s-ino Claude Nourmont, la prezidanto de la pedagoga sekcio (GEE), kiu bonvole akceptis provizore la sekcistrecon de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Francio. Neforge-seblan literaturan travivaĵon ĝuis la publiko dum la prezentado de Roger Bernard.

Merkrede okazis la konkludoj, kiujn mi ne ĉeestis, ĉar matene mi forlasis Gresiljonon. Mi devas do fari mian privatan konkludon: La gresiljona Pedago-

Foto: Dražen Domitrović



Parolas Zlatko Tišljariĉ en la malfermo de la Internacia Scienca Simpozio en Zagrebo (vd. paĝon 88).

gia Seminario estis ekzemplo kaj modelo, kion devas fari kaj kiel devas labori landa asocio konkorde kun la pedagogia sekcio, por altigi la nivelon de Esperanto-instruantoj kaj, pere de tio, altigi la nivelon de la instruado mem. Tute certe tiu dudeko da instruantoj alimaniere instruos la Internacian Lingvon post la seminario. Mi estas certa, ke ili tre volonte partoprenos ankaŭ la daŭrigon de la seminario.

Ljubljana (de la 3a ĝis la 5a de aprilo): *Pedagoga, postdiploma, perfektiga kurso* en Universitato E. Kardelj. Pli ol dudek pedagogoj el tri jugoslavaj respublikoj studas jam la duan jaron Esperantajn gramatikon, literaturon, historion kaj metodikon en Pedagogia Akademio de tiu universitato. La unuan jaron ĉiuj finis jam per sukcesa ekzameno (gramatika kaj literatura). La renkontiĝo estis la antaŭlasta en la nuna akademia jaro. La lasta okazos en majo. La lasta ekzameno okazos en septembro aŭ oktobro. Ĉiu kandidato dume devas verki diplom-laboraĵon. La programo de la kurso estas iom reduktita programo de la responda sekcio de la fako Esperanto en Univer-

sitato ELTE (Budapeŝto) kaj kongruas kun la postuloj de la Internacia Pedagoĝa Ekzameno de ILEI.

Programo: Vendrede: la kursanoj partoprenis modelan instruhoron en la lernejo D-ro Vito Kraigher. Instruis koleĝino Andjelka Sučić. Post la instruho en la instruista ĉambro de la lernejo, la gekursanoj analizis kaj kritikis ĝin.

Posttagmeza programo: 14h30-16h Metodologio (Szerdahelyi), 16h15-17h15 Historio de la Esper-

anto-movado (Szerdahelyi), 17h30-18h30 Seminario pri la prelegoj (Sonja Tavčar). Sabate: 8-9h30 Historio, 10-11h30 Metodologio (ambaŭ Szerdahelyi), 11h45-13h15 Seminario (Tavčar).

Tuj post la tagmanĝo mi veturis al Zagrebo, kie mi partoprenis la trian aranĝon dum mia rondvojaĝo.

Kvankam kaj en Gresiljono kaj en Ljubljana okazis pedagogaj kursoj perfektigaj, ili esence diferencas: la franca estis pure movada, dume la slovena okazis en la kadroj de universitato kun duon-oficiala karaktero. La franca estis nur tritaga seminario, la slovena estas dujara kurso. Sed la celo de ambaŭ estis la sama: perfektigi instruistojn – ĉe la francoj plie por la plenkreskulaj kursoj, dum ĉe la slovenoj por la lernejoj. La slovena movado estas forte lernejo-centra.

Zagrebo (de la 5a ĝis la 7a de aprilo): *Internacia Scienca Simpozio*, aranĝita de Kroatia Esperanto-Ligo kunlabore kun Internacia Kultura Servo. Ĉi-foje la epiteto "scienca" estas komprenenda en sia plena senco. La kadrotemo estis "La rolo de Esperanto en la monda porpaca agado", kontribuo al Internacia Jaro de Paco, kiu estis dividita jene:

A) Esperanto kaj ĝiaj rilatoj al mondaj organizaĵoj, B) Eduka valoro de la Interna Ideo: 1. esperantistoj en militaj cirkonstancoj, 2. la Esperanto-movado kiel edukejo por plia demokratiigo en internaciaj kontaktoj.

Oni malofte troviĝas en medio, kie la lingva nivelo de la ĉeestantaro senescepte estas tiel alta, kiel ĉi-foje estis en Zagrebo. Tiu alta lingva nivelo ebligis vere profunde sciencajn prelegojn kaj diskutojn. La strikte disciplinita program-gvidado ebligis la senrestan realigon de la antaŭfiksita tagordo. La prelegantaro kaj partoprenantaro estis internaciaj: aldone al la jugoslavo, ĉeestis gastoj el Aŭstrio, Bulgario, FR Germanio, Hungario, Italio kaj Svislando.

Programo: Prelegoj de Flóra Szabó-Felső, Claude Piron, Jozo Marević, Zlatoje Martinov-Jovan Zarković kaj Peter Zlatnar. Posttagmeze: Tibor Sekelj, Josip Vrančić, Vesna Staničić-Burchards, Violin Oljanov.

Dimanĉe: Hans-Michael Maitzen, István Szerdahelyi, Antun Šimunić kaj Djordje Dragojlović. Posttagmeze: Otan Pancer, Nikola Račić kaj Ariela Colimbin – poste: findiskutoj, konkludoj. Lunde: Akcepto ĉe Ligo por Paco de Kroatio.

La zagreba agado – se oni ĝin volas koncize karakterizi – baziĝas sur science prilaborita sociologia fundamento, ĉu ĝi estas instru-eduka (kp. la "Zagrebanoj Metodono"), ĉu pupteatra aŭ renkontiĝo de denaskaj esperantistaj infanoj, ĉu socipolitika, kiel la nuna simpozio.

La zagrebanoj ĝuste rimarkis, ke la agado pri kaj por Esperanto ne eblas en ia socia vakuo, socia eksterterritorio. Bonŝance ili havas talentajn junajn fortojn, kiuj kapablas science esplori la soci-politi-

FILOZOFIO

Al nova filozofia tradicio

Altnivelaj filozofiaj verkoj povas karakterizi lingvon kiel gravan. Se oni kreas filozofian literaturon en la Internacia Lingvo, profesiaj filozofoj interesiĝos pri ĝi, kaj aperos aliaj novaj profesiaj filozofoj. Ekde 1983 la esperantistaro havas ĉi-rilate sian filozofian revuon *Simpozio*, regule publikigatan marte kaj septembre. Ĝi samtempe estas la oficiala organo de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT).

La profesiaj filozofoj, kiuj scipovas Esperanton, estas nur ĉirkaŭ dek... Tamen, la revuo *Simpozio* vendiĝas jam al iom pli ol cent personoj, ĉar ankaŭ neprofesiuloj interesiĝas pri la filozofio. Ĉiu homo estas filozofo, kaj ĉiu esperantisto bezonas iom da filozofio por disvastigi la Internacian Lingvon.

Iom post iom *Simpozio* akiras propran vivon. La ĝis nun cent abonantoj pagas preskaŭ duonon de la elspezo por la entrepreno. Por atingi stabilecon estas necesaj pli ol ducent abonantoj. Do, ni invitas vin esti unu el tiuj bonfarantoj. La faka literaturo de Esperanto definitive estos elemento en ĝia venko. Cetere, troviĝas Fonduso Simpozio ĉe UEA (kontokodo simp-k), sed ankoraŭ kun malgranda sumo, por subteni la organon kaj asocion.

Jam okazis renkontiĝoj de filozofoj en la Universalaj Kongresoj en Budapeŝto, Vankuvero kaj Aŭsgburgo, kaj speciala en Metz.

Koncerne la publikigon de libroj pri filozofio, ekde la fondo de FAT ili fariĝis pli fakaj, ekzemple: *Konsolo de la filozofio* de Boecio (trad. Goodheir), *Diskurso pri la metodo* de Kartezio (trad. E. de Zilah), *Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo* de Porfirio (trad. E. Pauli), *Rekta pensado*, *Pri dubo kaj certeco* kaj *Mil jaroj de kristana filozofio* de E. Pauli. Venos pliaj.

Esperanto povas krei kulturon, precipe tutnovan filozofian tradicion, ĉar ĝi estas pli adekvata por la interesoj de la filozofiantoj. FAT, Rua Conselheiro Mafra 176, BR-88000 Florianópolis – SC, Brazilo.

Evaldo Pauli

kajn aspektojn de Esperanto kaj meti siajn agadojn en tiujn kadrojn. Eble ili trovos iom pli da loko ankaŭ en sia estonta aktivado por pli intensa lerneja politiko.

[Cetere, la materialo de la simpozio aperos kaj Esperante kaj kroate. La prelego de Szerdahelyi krome aperos en *Internacia pedagogia revuo* (n-ro 2/1986).]

Se resumi la spertojn pri la triopo, ĉu ekzistas iu **komuna denominatoro**? Mi konstatis la jenajn:

- a) konscia klopodo al profesieco kaj fakeco,
- b) forta deziro altigi la lingvan kaj fakan nivelon ĝenerale

AŬTISTOJ

Aŭta fakvortaro

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) estas faka organizaĵo, kunlaboranta kun UEA. Pli ol 1 150 personoj jam aliĝis el 30 landoj.

Per multaj streboj, Jean Guillaume, la antaŭa sekretario de IEKA, formis fortan reton de 29 fakdelegitoj kaj sukcesis varbi grandan nombron da aliĝintoj.

Dum la pasintaj jaroj multe laboris skipo de ok specialistoj por starigi fakvortaron en sep lingvoj. Oni nun preparas la manuskripton por eldono.

Lastjare IEKA sendis al ĉirkaŭ 50 petintoj mapojn kun indikoj de la urboj, kie loĝas fakdelegitoj pri aŭtomobilismo kaj turismo.

IEKA planas helpi la aŭtistojn i.a. per mapoj kaj vojaĝplanoj kaj disvolvi la SOS-aŭtoservon. IEKA deziras kontaktojn kun aliaj fak-organizaĵoj, ekz. turismaj kaj teknikaj, por reciproka informado. Ankaŭ pli vastaj kontaktoj kun neesperantistaj medioj estas planataj.

La adreso de IEKA estas: R. Bastong, Sek. de IEKA, 84 bis Rue H. Prou, F-78340 Les Clayes sous Bois, Francio.



rale kaj precipe tiun de la Esperanto-instruantoj; serĉi la movadajn kaj instituciajn eblojn por ties efektivigo,

c) la ĝusta formulado de la esperantismo kiel socia fenomeno; serĉadi nunajn kaj estontajn sociajn funkciojn de la Internacia Lingvo; anstataŭigi sloganojn per raciaj argumentoj, propagandon per objektiva informado – kaj fine,

ĉ) ne eblas ne rimarki, ke malantaŭ ĉiuj ĉi iniciatoj troviĝas unuopuloj, kiuj havas eksterordinaran altirforton, organizan kapablon, neelĉerpeblan paciencon kaj entuziasmon por efektivigi tiun celon, kiun ili mem difinis kaj kiun ili sukcesis akceptigi en sia rondo. Tiu fenomeno iĝas ĉiam pli ĝenerala. Estus eraro perforte klopodi al ia unuformigo, ĉar tio tutcerte fiaskus. Nur la plurismo estas akceptebla, la akcepto kaj estimo de tiuj diverstipaj, tamen konverĝaj iniciatoj. La piramideca strukturo en volontula movado ne funkcias. Nur inteligenta kaj sobra kunordigado de tiuj diverstipaj aktivadoj estas celkonforma, kunordigado, kiu kondukas la disipantajn metiejojn al libervola kunlaborado. Ĝuste tial ILEI neniam konsideras sin ia "gvida" organizaĵo. Modeste sed konscie ĝi proponas siajn servojn por kunordigi tiujn aktivadojn, kiuj apartenas al ĝia kompetento.

Ŝajne tio estas la fina konkludo, kion mi konsideras jam kiel antaŭventon de la komenciĝonta dua jarcento de Esperanto.

István Szerdahelyi

VEGETARISMO

Fakkongresa informado

Per ĉi tiu artikolo mi ne volas sugesti, ke, ekzemple, oni manĝu esparton por pli bone paroli Esperanton! Kaj mi ne diskutos pri mia konvinko, ke senvianda dieto povas krei pli sanan, do pli vigan, esperantiston. (Pri tio vi povas legi en nia revuo *Esperantista vegetarano*, de kiu ekzemplero estas havebla kontraŭ unu internacia respondkupono de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA), Clayton House, Butterton, Leek, Staffs., ST13 7SR, Britio.)

Pli interesa por la ĝenerala publiko (ja eĉ se vi estas buĉisto!) estas la laboro de TEVA inter vegetaranoj neesperantistaj, ĉar niajn sukcesojn vi eble povos ripeti inter viaj propraj samfakuloj. Kaj nenie oni povas fari tiun laboron pli efike ol dum internaciaj kongresoj, ĉar tie la problemoj de internacia komunikado sen Esperanto estas klaraj; la danĝerojn de flamoj oni lernas plej bone ĉefajre, ĉu ne? Estas tamen grave, ke oni ne prezentu sin kiel fanatikulon; estu ĉiam helpema kaj bonhumora kaj ne malŝparu tempon, parolante pri Esperanto al tiuj, kiuj – kiel

faraono en la Biblio – jam malmoligis sian koron. Kun ili nur gaje moku la oftajn malperfektaĵojn de samtempa interpretado.

Jen tio, kion tri membroj de TEVA sukcesis fari fine de marto en Jugoslavio dum la 28a Mondkongreso de Internacia Vegetarana Unio. Unue, pro laboro por vegetarismo dum du antaŭaj kongresoj, al mi estis asignita duonhoro komence de la oktaga programo, por prelegi pri "Vegetarismo kaj Esperanto". Tiu prelego, prezentita anglalingve kaj interpretita en la germanan kaj kroatserban, emfazis la helpon, kiun Esperanto proponas ne nur al la internaciigo de vegetarismo, sed ankaŭ al unuopaj vegetaranoj. Du aliaj faktoj donis pozitivan impreson: la prelego daŭris nur dek kvin minutojn kaj kun alia esperantisto mi aldonis simplan, humuran konversacion por montri, ke la lingvo vivas. Due, ni havis budon, kiu konsistis el 1) ekspozicio de belaspektaj libroj kaj revuoj Esperantaj, 2) varbfolioj en sep lingvoj, 3) aĉetebaj aĵoj, ekz. skribiloj kaj insignoj, kun vegetarana simbolo kaj la vortoj "Vivu kaj lasu vivi", 4) lernolibroj kaj vortaroj

diverslingvaj. Trie, ni ĉiutage aranĝis rondon por komencantoj, ni notis la adresojn de kongresanoj, kiuj pozitive reagis al la ideo de Esperanto, por informi naciajn Esperanto-asociojn, ni tri sidis mal-kune dum manĝoj, dezirante "Bonan apetiton" al niaj kunsidantoj kaj diskutis pri Esperanto nur kun tiuj (ne malmultaj), kiuj elektis fari tion.

Neniu kongresano plu povas supozi, kiel multaj antaŭe, ke Esperanto aŭ mortis aŭ ne ekzistas. Homoj el dek unu landoj ĉeestis niajn porkomencantajn rondojn. El la ĉirkaŭ dek kvin membroj de la estraro de Internacia Vegetarana Unio almenaŭ ses forte subtenas la iaman oficialigon de Esperanto – tri jam lernis ĝin – kaj du kongresanoj, kiuj planas venontjaran konferencon pri "Homoj, bestoj, planedo" nun intencas, ke Esperanto estu unu el la tri oficialaj lingvoj. Mi fine aldonu, ke en la lasta tago vizitis min nekongresano por diri, ke li intencas lerni Esperanton. Li estis la ĉefa interpretisto.

Christopher Fettes

MUZIKO

Internacia Esperanto-Ĥoro – sukcesoj kaj problemoj

Pasis jam kvin jaroj de tiu grava momento, kiam la unuan fojon eksonis Internacia Esperanto-Ĥoro. Kvin jarojn ĝi ornamas la fermojn de la Universalaj Kongresoj, kolektante gekantistojn el la tuta mondo sub la slogano: "Kuniĝu ni per nia kant'!"

La ideo pri internacia ĥoro aperis jam antaŭ dek jaroj — en 1975, dum la UK en Kopenhago. En la jarkunveno de Muzika Esperanto-Ligo (MEL), profesoro Humphrey Tonkin, tiam prezidanto de UEA, proponis la ideon fondi ĥoron, kiu povus ekzerci dum la semajno de la UK kaj eventuale prezenti publikan koncerton, konsistantan aŭ el muzikverko aŭ el programo de malpli longaj pecoj de la plej bonaj komponistoj. Tiu nobla ideo longe restis nur intenco, kiu ne povis efektiviĝi. Dum la 62a UK en Rejkjaviko okazis speciala kunsido, aranĝita de UEA, kiu pri-traktis la ideon fondi internacian ĥoron. En la protokolo de tiu kunsido oni legas: "Necesas tuj nun elekti ĥorestron kaj akompaniston, elekti verkojn, komisi tradukon, prepari partiturojn, inviti memproponantojn, enprogramigi la laboron en ĉambro kun taŭga fortepiano al partoprenontoj, kiuj antaŭanonce sin." Kiel oni vidas, la afero estas tre komplika kaj postulas multe da laboro kaj da elspezoj, kaj tial neniun kuraĝis okupiĝi pri ĝi.

Venis la jaro 1980. Dum la semajno de la 65a UK en Stokholmo mi provis kaj sukcesis fondi la delonge proponitan Internacian Ĥoron. La unua ĥor-ekzerco okazis la 5an de aŭgusto 1980. La unuaj gekantistoj skribis siajn nomojn kaj adresojn per propra mano. Mi konservis la paperon kiel historian dokumenton. Mi eĉ preparis albumon por fotoj de ekzercadoj kaj prezentadoj kaj aparte fotojn de la ĥoranoj kun mal-longaj priskriboj de ĉiu el ili. La unua prezentado okazis la 9an de aŭgusto 1980, dum la fermo de la 65a UK, per du kantoj. Ĉu la prezentado estis sukcesa? La revuo *Esperanto* kaj la gazeto *Heroldo* respondis jese: "Agrabla surprizo montriĝas «Inter-

Foto: Hermann Schmid



Internacia Esperanto-Ĥoro, gvidata de Dimitr Terziev, kantas por la aŭgsburga loĝantaro (1985).

nacia Kanthoro», kiu organiziĝis dum la kongresa semajno, sub la gvido de la bulgara muzikisto Dimitr Terziev.” (*Esperanto*, 1980, p.157).

Post tiu unua sukcesa prezentado sekvis la dua — en Antverpeno dum la 67a UK, la tria en Budapeŝto dum la 68a UK kaj la kvara en Aŭgsburgo, kiu okazis la 10an de aŭgusto 1985, dum la fermo de la 70a UK. Ni konstatas, ke dum tiu kvinjara periodo la Internacia Ĥoro progresis. Dum ĉiu nova prezentado la nombro de la ĥoranoj pligrandiĝis, kaj la kvalito de la interpreto plialtiĝis. La nomo «Internacia Esperanto-Ĥoro» pli kaj pli populariĝis inter la esperantistaro. Tion sufiĉe klare pravas la fakto, ke ĉi tiun jaron ni ricevis la tiel longe deziratan oficialan subtenon de la Universala Kongreso. De tiu tribuno mi esprimas mian kontenton kaj elkoran dankon al la Universala Kongreso kaj precipe al ĝia tiama konstanta sekretario Diccon Masterman, al la LKK-anoj kaj ankaŭ al la estraro de Bulgara Esperanto-Asocio, kiuj subtene helpis min veni al la kongresoj kaj realigi kun ilia kunlaboro la kvarfojan prezentadon de la Internacia Ĥoro. Do, kuraĝon, karaj samideanoj kaj ĥoranoj; la estonteco allogas nin por novaj sukcesoj!

Dimitr Terziev,
estro de Internacia Esperanto-Ĥoro

FILATELO

Premiitaj ekspoziciaĵoj

Jam antaŭ 1914 ekzistis ĉe UEA fako por kolektado, kaj en 1932 fondiĝis Tutmonda Asocio de Kolektantoj. La militoj tamen ĉion cindrigis.

Post renkontiĝo de dekduo da aktivaj Esperanto-filatelistoj en internacia poŝtmarka ekspozicio en Karl-Marx-Stadt (1967), oni fondis en la posta jaro Amikan Rondon de Esperantaĵ-Kolektantoj (AREK). Poste ĝi unuiĝis kun Esperanto-Ligo Filatelista (ELF). Cent tridek membroj en 35 landoj kolektas ĉiajn filatelaĵojn lige kun Esperanto, sed ankaŭ, iom flanke, glumarkojn kaj insignojn.

Laŭ *Katalogo de Esperanto-poŝtstampoj 1983* (kun suplementoj), aperis ĝis aprilo ĉi-jare 685 diversaj poŝtaj stampoj, 42 Esperanto-poŝtmarkoj plus 25 variaĵoj kaj 36 afrankostampoj. En 1911 aperis en Bavario la unua Esperanta poŝtmarko, kiu popularigas sur apuda talono la vegetaran restoracion "Esperanto" en Munkeno. Tiu poŝtmarko estas ege malofta kaj troviĝas en nur du kolektoj (en Usono kaj Germana DR).

La unua poŝta Esperanto-stampo aperis okaze de la 8a Universala Kongreso en Krakovo (1912). *Katalogo de Esperanto-tutaĵoj* de Vana notas 690 (!) poŝt-

ajn kartojn kaj kovertojn kun surprisoj pri aŭ en Esperanto.

Ni kolektas filatelaĵojn ankaŭ pri famaj personoj, kiuj okupiĝis pri artefaritaj lingvoj, mem praktikis Esperanton aŭ simpatiis kun Esperanto. Pluraj filatelitoj kolektas ne nur por enŝranka albumo, sed ekstermovade utiligas la Esperanto-filatelon por popularigi Esperanton. Tiel dum la lastaj jaroj aperis artikoloj pri Esperanto en la plej gravaj naciaj filatelaj gazetoj, ofte riĉe kaj eĉ kolore ilustritaj.

Filatele kaj movade spertaj filatelitoj "komponas" filatelajn elmontraĵojn pri Esperanto por prezenti en landaj kaj eĉ ofte en tutmondaj ekspozicioj. Nia ĉina klubo amiko Song Shengtan ekzemple prezentis sian Esperanto-filatelan elmontraĵon en la unua tutlanda "Chinapex 83" kaj tie gajnis arĝentan medalon.

En la jubilea jaro okazos Esperanto-filatela ekspozicio kadre de la internacia poŝtmarka ekspozicio "750 jaroj Berlino". Okazigos ĝin Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana DR kunlabore kun Filatela Asocio de GDR kaj membroj de ELF-AREK. Partopreni rajtas elmontraĵoj kun almenaŭ arĝent-medala premio el nacia ekspozicio. En tiu "Esperantofila" oni povos renkonti la ekspoziciaĵojn de Song Shengtan (Ĉinio), de Bartošik (Ĉeĥoslovakio), de Fekete (Hungario), de Mikulski (Pollando) k.a.

Estus bone, se ankaŭ aliaj landaj asocioj, kunlabore kun la koncernaj landaj filatelaj asocioj, okazigus, kadre de nacia filatela ekspozicio, jubileajn filatelajn Esperanto-ekspoziciojn. Volonte niaj ekspoziciantoj disponigus siajn materialojn pere de koncernlandaj filatelaj asocioj.

Jen urĝa peto al vi: Se en via lando aperas nova marko, stampo, tutaĵo, glumarko aŭ insigno, bonvolu informi la redakcion de nia informilo *La verda lupeo* (R. Burmeister, W.-Firl-Str. 30, DDR-9047 Karl-Marx-Stadt, Germana DR).

Rudolf Burmeister

TRADUKADO

Formiĝas internacia reto por komerca tradukado

La ekzisto de Internacia Tradukreto pere de Esperanto ne plu estas propono. Ĝi ekzistas pro la multnombraj entuziasmaj leteroj jam ricevitaj. Jam en multaj landoj volontuloj sin anoncis, kaj la kluboj baldaŭ stariĝos. Momente temas nur pri rondoj por pristudi la organizon. Ni ne plu rajtas longe atendi.

Ni posedas du malŝlosilojn por sukcesi. Ili estas 1) la lingvo mem – facila, neŭtrala, riĉa ne komparebla

tradukilo jam internacia – kaj 2) tutmonda reto da tradukantoj (-istoj) pretaj ekfunkcii.

Ni jam kreis "Franclingvan Klubon por Tutmonda Traduk-reto pere de Esperanto", kies unuaj taskoj estas:

1) ellabori taŭgan statuton; 2) registri laŭ profesio aŭ intereso la pretajn kunlaborantojn; 3) kiam komen- ciĝos la traduklaboro, verki artikolojn por la gazetoj, anoncanta la ekfunkcion de tiu originala internacia tradukreto. Tiuj artikoloj, malsimilaj laŭ la destino, ĉefe celos la teknikajn revuojn, kies legantoj estas konfrontataj de tradukproblemoj. La kvalito de la artikoloj kaj la momento de ilia eldono ludos gravan rolon.

Ni jam scias, ke la plimulto de la interesitoj pretas labori senpage kaj konsideras tiun laboron kiel "plian kotizon al la sukceso de Esperanto". Kvankam la pro- fito ne estas nia motivo, la monaspekto estas grava.

Ĉar la organizaĵo eble fariĝos nur komerca estonte, kiel firmao kun salajruloj, ni devas zorge pristudi kiom kaj ĝis kiam la "pure esperantista bazo" devas ĝin regi.

Inter la unuaj paŝoj estas oficialigi la landajn klu- bojn en la landoj, kie tio necesas. Oni proponas klo- podi registri klubojn kiel edukajn, neprofitdonajn organizaĵojn, por eviti nenecesajn impostojn ks., kie tio validas.

Ĉi tiu artikolo celas nur informi kaj instigi al kun- laboro kaj diskutoj pri progresigo de la afero. Ni estas firme konvinkitaj, ke la enkonduko de Esperanto en la komercan kaj industrian aktivadon estas grava paŝo al ĝia sukceso.

Listo da volontuloj jam estas havebla de la provi- zora sekretario, C. Bodson, Montigny, F-59225 Clary, Francio. Tel. 27 85 31 10. Telekso 820840.

Claude Bodson

FERVOJISTOJ

Vigla informa, termi- nara kaj kultura agadoj

La lingvo Esperanto kiel interhoma fenomeno jam frue allogis anojn de aparte interpopola profe- sio, la fervojistojn. Tio kondukis al la fondo de Internacia Asocio de la Esperantistoj-Fervojistoj en 1909. La du mondmilitoj ne povis detrui la asocion, kiu la 4an de aŭgusto 1948 reformiĝis en la nuna formo kaj sub la hodiaŭa nomo Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFE).

Kontraŭe al la pli frua asocio, kiu vastskale dependis de la sindikatoj fervojistaj, la nuna federa- cio dekomence estas ĉiel sendependa kaj gvidata laŭ komplete demokrataj principoj. Tio esprimiĝas en ĝia statuto, laŭ kiu la decida organo estas komitato, al kiu la landaj asocioj delegas komitatanojn. La kvinkapa internacia estraro realigas la decidojn de la komitato kaj respondecas al ĝi. Tiu sistemo funkcias senripoĉe. La 19 federaciaj asocioj troviĝas en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj kaj en Japanio, krome individuaj membroj en ĉiuj kontinentoj.

Informado

La federacia agado estas tre varia. Por atingi la celojn, ekzistas multaj rimedoj. Unu el la plej gra- vaj, kvankam pli-malpli interna, estas la oficiala organo *Internacia fervojisto*, aperanta dumonate kun jara paĝnombro de 80 ĝis 100. Sen tiu organo la federacio ne estus vivkapabla en la nuna formo. Certe ne estas malgrave, ke 15 landaj asocioj de IFEFE eldonas proprajn naciajn organojn parte eks-

kluzive en Esperanto, parte en Esperanto kaj nacia lingvo. Ili komune havas amplekson de pli ol 800 paĝoj jare.

Por disvastigi Esperanton en neesperantistaj medioj, la federacio utiligas aliajn rimedojn, nome sur internacia nivelo la ĉiujaran kongreson, sur nacia nivelo la jarajn kunvenojn, kiuj okazas en la plej multaj landaj asocioj. Helpe de gazetaraj konferen- coj kaj intervjuoj ĉe radio kaj televido oni informas pli vastan publikon. Per kongresa gazetara servo oni zorgas pri klara informado de la kongresanaro kaj precipe de redaktoroj kaj funkciuloj de landaj aso- cioj kaj de la federacio mem. Ni provizas revuojn de fervojistaj sindikatoj kaj oficialajn bultenojn de fer- vojoj per nacilingvaj artikoloj kaj raportoj sur nacia kaj loka niveloj, sed ankaŭ la gazetaron kaj aliajn amaskomunikilojn. Altrangaj fervojistoj, kaj foje trafikministroj, partoprenas en naciaj kaj internaciaj aranĝoj aŭ eĉ transprenas ties patronecon.

Tegmenta organizo

Nepre menciindas gravega, pure fervojista kul- tura apartaĵo Inter fervojistoj en ĉiuj landoj regas vigla kultura vivo jam de pli ol cent jaroj. Ekzistas ekz. orkestroj, ĥoroj, grupoj pri folkloro, de filate- listoj, fotistoj, filmemuloj, radio-amatoroj kaj aliaj; kaj ankaŭ la esperantistoj havas sian lokon inter ili. Ĉiuj tiuj grupoj estas kunigitaj sur landa nivelo en komuna kultura organizo. Kaj tiuj landaj organizoj estas unuigitaj sur internacia nivelo en grandega "tegment-organizo", la tiel nomata Internacia Fede- racio de Kulturflegantaj Fervojistoj (FISAIC). Pro tio la IFEFE-kongresoj okazas jam de multaj jaroj sub aŭspicioj de FISAIC, kiun ĉiam reprezentas altranga

funkciulo. Entute, tio signifas fortan moralan kaj ofte ankaŭ ekonomian apogon por la esperantistoj fervojistaj.

Terminara Komisiono

Pro la profesiaj interplektoj internaciaj de la fervojistoj, IFEF havas specialajn fakajn taskojn. Por plenumi tiujn taskojn, IFEF disponas pri du konstantaj komisionoj.

En la Terminara Komisiono jam de jardekoj laboras kolegoj el teknikaj kaj neteknikaj funkcioj kun la celo fiksi la terminojn de la nekredeble multspeca 'fervojista lingvo', tiel ke la fervojistoj (kaj nefervojistoj) en la tuta mondo povu kompreni kaj uzi ilin. Bedaŭrinde la komisiono ne mem povas decidi pri la rapideco kaj amplekso de sia laboro, ĉar ĝi vaste dependas de jam ekzistanta oficiala terminaro seslingva (11 000 terminoj) de Unuiĝo Internacia de Fervojoj (UIC). Jam de jaroj la fakuloj de UIC okupiĝas pri multaj novaj aŭ ŝanĝotaj terminoj en nova kvara eldono de sia terminaro, kaj la komisiono de IFEF devas vole-nevole atendi la rezulton de tiu longdaŭra laboro, antaŭ ol povi prezenti la Esperantan version.

Sep landaj asocioj paralele eldonis inter 1967 kaj 1978 terminaretojn diversampleksajn en siaj naciaj lingvoj. Tio jam multe helpas en la verkado de fakaj artikoloj kaj raportoj. Por kunordigi la laboron sur tiu tereno, la komisiono kreis apartan internacian ligilon sub la nomo *Terminara kuriero*.

Fakprelega Komisiono

La Fakprelega Komisiono zorgas por regula funkciado de fakaj prelegoj en la ĉiujaraj kongresoj. Minimume unu prelego pri fakaj novaĵoj aŭ problemoj el la kongreslando estas prezentita al la kongresanoj. Plej ofte ilin kompletigas diapozitivoj aŭ filmoj, ankaŭ per surlokaj fakaj ekskursoj al fervojaj

instalaĵoj. La tekstoj de tiuj prelegoj regule aperas en formo de broŝureto kaj ankaŭ en la internacia organo. Ofte la tekstoj estas tradukitaj en naciaj lingvoj kaj donataj al fervojaj interesitoj, dokumentaj servoj kaj bibliotekoj.

Plia faka ero en la IFEF-kongresoj estas la prezentado de tre koncizaj referaĵoj sub la titolo "Aktualaĵoj el mia lando". Tiel kaj la kongresanoj kaj la tuta membraro — pere de *Internacia fervojisto* — el kompetenta fonto ekscias ion pri la plej ĝisdataj fakaj eventoj. La du komisionoj komune zorgas, ke la prezentataj tekstoj lingve kaj fake estas senripoĉaj.

Kulturaj aranĝoj

Memkompreneble estas, ke en la kadro de IFEF-kongresoj oni aranĝas allogan kulturen programon, ofte en kunlaboro kun aliaj fervojistaj kulturaj grupoj. Specialaĵo de IFEF estas, ke jam de 25 jaroj oni en vintro aranĝas skisemajnon en taŭga montara loko, kiu ĉiam altiras ĝis cent sportemulojn, kiuj krom la ĉiutaga skiado ĝuas la apartan etoson de tia pli familiara komuneco.

Ekstera agado

En oficialaj finnaj horaroj jam de 1921, sed de post 1953 en naŭ pliaj horaroj aperas la klarigoj por la pasaĝeroj ankaŭ en Esperanto. Kaj laŭ iniciato de landaj IFEF-asocioj dekduo da fervojaj kompanioj eldonis siajn varbilojn kaj informilojn — ofte ampleksajn kaj bele ilustritajn — ankaŭ en la Internacia Lingvo. Kelkfoje landaj asocioj povis atingi, ke okaze de Universala Kongreso la respektiva fervojo instalas specialan ĝiĉeton en la kongresejo kaj disponigis kelkajn fervojistojn esperantistajn por deĵori dum la kongresa semajno. Tiamaniere la kongresanoj estis servitaj rapide kaj senĝene, dum samtempe estis evitata lingva kaoso ĉe la stacidomaj ĝiĉetoj.

La aŭtoro ne pretendas doni kompletan bildon de la agado kaj esenco de la fervojista Esperantomovado kaj ties faka organizo. Tamen la priskribitaj faktoj certe donas ĝeneralan impreson pri tio, kion faka Esperanto-organizo kapablas fari spite al la limigitaj financaj rimedoj.

Joachim Giessner



Esperanto-parolantaj fervojistoj servis al la publiko dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo.

FILOLOGIO

Opiniforma potencialo

Unuflanke la fakaj Esperanto-organizaĵoj strebas disvastigi Esperanton en specialaj medioj — profesiaj, sciencaj, sociaj, hobiaj —, aliflanke ili aplikas kaj

elmontras la Internacian Lingvon en diversaj sferoj de la homa agado. Tiujn konsiderojn havis la elstaraj esperantologoj-filologoj Eŭgeno Bokarev, Atanas D. Atanasov (pseŭdonimo Ada) k.a., kiam en 1963 dum la 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio ili fondis Internacian Unuiĝon de la Esperantistoj-Filologoj (IUEF).

Laŭ mi, IUEF konsiderinde diferencas de aliaj fakaj organizaĵoj. La filologoj ja estas homoj, kiuj profesie kaj science okupiĝas pri lingvoj, kaj ilia rilato al Esperanto grave influas la socian opinion.

Ĉar ekzistas malsamaj konceptoj pri la nocio "filologio", ĝi estas eksplicite formulita en la statuto: "Filologio estas scienco, kiu surbaze de historiaj dokumentoj, de literaturo, arkeologio, folkloro, esploras la lingvajn fenomenojn kaj la lingvo-evolucion."

IUEF akceptas kiel kunlaborajn membrojn esperantistojn, kiuj ne havas diplomojn pri universitataj filologiaj studoj, sed kiuj tamen montras intereson pri lingvaj fenomenoj.

La unuiĝo trifoje jare eldonas la bultenon *Filologo*, kiu krom organizaj informoj entenas esperantologiajn, interlingvistikajn kaj aliajn sciencajn traktaĵojn. En ĝi partoprenas multaj akademianoj kaj, kvankam ĝin ricevas nur 160 membroj, ĝi akiris renomon.

En preskaŭ ĉiu Universala Kongreso okazas fakkunveno de la filologoj kun esperantologiaj prelegoj kaj diskutado. Estas organizataj i.a. seminarioj kaj kursoj por tradukemuloj. Okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto ni preparas grandan internacian simpozion antaŭ la fino de 1987 en Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica (suda Bulgario), kun prelegoj de elstaraj esperantologoj kaj interlingvistoj.

Ĉi-jare la bulgara sekcio organizas en la sama loko seminarion por neesperantistaj lingvistoj el la bulgaraj universitatoj kaj aliaj superaj institutoj. Per tio oni intencas informi la plej elstarajn filologojn en la lando pri la esploroj kaj alia interlingvistika agado de ties kolegoj en eksterlando. Oni krome faris paŝojn al bulgaraj superaj instancoj por estigi stipendion por juna filologo, kiu preparos kaj defendos doktoran disertacion pri interlingvistika temo. La decido estas atendata. En Bulgario jam estas kelkaj stipendioj por studentoj, kiuj kontrakte promesas post la fino de la studoj instrui la Internacian Lingvon kaj defendi bakalaŭran verkon pri Esperanta temo.

Ju pli da membroj, des pli efika estos nia aktivado. Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj, kv. Emil Markov, P.k. 66, BG-1404 Sofia, Bulgario.

Violin Oljanov,
prezidanto de IUEF

SKOLTADO

Eblecoj estas grandaj

En la komenco de nia jarcento, preskaŭ en la sama momento, naskiĝis du movadoj, la Esperanta kaj la Skolta.

En la unuaj jaroj la Skolta Movado havis ecojn, kiujn almenaŭ mi ne povas aprezi. En ĝi estis fortaj naciaj sentoj, kaj ofte ĝi havis militistan karakteron. En ĝi la britoj ludis ĉefan rolon, malgraŭ ke baldaŭ fondiĝis internacia skolta organizaĵo.

Jam tre frue (1918) Skolta Esperanto-Ligo (SEL) estis fondita. Fakte ĝi estis la unua internacia skolta organizaĵo. Ĝia sukceso estis relative granda. En la Monda Ĵamboreo de Gödöllő (1933) Esperanto estis oficiale uzata de kelkaj servoj. Tamen la pozicio restis tre malfacila, kaj sub brita influo oni en 1934 eĉ tute malpermesis la uzon de Esperanto en la Skolta Movado.

Poste la situacio grave ŝanĝiĝis. La Skolta Movado grandparte perdis siajn malbonajn ecojn kaj evoluis ĝis grandega junulara organizaĵo, kiu ofte ludas gravan rolon en la socio, precipe en junaj ŝtatoj. Gravaj eventoj estas la Mondaj Ĵamboreoj, en ĉiu kvara jaro. En tiuj kolektiĝas 10-15 mil skoltoj, kiuj tie spertas internacian amikecon. La malpermeso de Esperanto estis nuligita, kaj iel oni eĉ rekonas la valoron de Esperanto, kvankam oni opinias, ke ĝi estas iom superflua.

SEL dume havis siajn bonajn kaj malbonajn periodojn, sed tamen ĝia kresko stagnis. Kaŭzoj por tio estas, ke la skoltoj mem ofte estas tro aktivaj por ludi utilan rolon en ĝia organizado kaj cetere la skolta movado estas kvazaŭ 'koridoro', tra kiu la plimulto eliras. Nur malgranda grupo restas en la movado por servi ĝin kiel gvidantoj.

Tiel ankaŭ la membraro de SEL ĝenerale estas tre 'flua', kaj la estraraj taskoj ĉefe dependas de la bonvolo de eksskoltoj aŭ eĉ de homoj, kiuj mem neniam apartenis al la aktiva skoltmovado. Tamen multloke ekzistas bonaj eblecoj. Jam ofte ni konstatis, ke ĉirkaŭ aktiva persono kolektiĝis rondo de membroj.

Dum internaciaj skoltaj kunvenoj ni kiel eble plej multe informas pri Esperanto. Taŭgaj iloj por tio estas niaj broŝuroj, kiuj aperis en ok naciaj lingvoj sub la komuna titolo: *Vastaj horizontoj*. Ili enhavas ideojn kaj proponojn por internaciaj skoltaj aktivadoj, kaj kvazaŭ hazarde mencias la valoron de Esperanto por tio. Ili plaĉe moderne aspektas, kaj mankas al ili la malagrabla altrudema aspekto, kiun oni trovas en multaj varbiloj.

Por faciligi la unuan kontakton inter skoltaj kaj Esperanto, nia propra enkonduka lernolibro prezentas la lingvon en la kadro de skoltaj agadoj. Ĝi titoliĝas *Ĵamborea lingvo*. Membroj de SEL kvarfoje jare ricevas la gazeton *La skolta mondo*. Aktivaj kunlaborantoj kaj funkciuloj ricevas la laŭokazan informilon *Ĉiam preta*.

Ni konstatas, ke la eblecoj por Esperanto en la Skolta Movado estas grandaj kaj ke la necesaj iloj grandparte ekzistas. La necesaj semantoj kaj rikoltantoj tamen tro ofte mankas. Sed eble ĉi tiu raporto instigos kelkajn al kunlaboro: SEL, Postbus 433, NL-1500 EK Zaandam, Nederlando.

J.K. Hammer

INTERNACIA JARO DE PACO

MEM en Volgogrado

Tridek reprezentantoj aŭ anstataŭantoj de landaj sekcioj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) el Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio,

Organizita honore al Internacia Jaro de Paco komune de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kaj Sovetia Sekcio de MEM, kun la subteno de Unio de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (SSOD), la renkontiĝo markis novan etapon en la laboroj de ASE, kiu debutis en 1979 por kunigi la agadojn de esperantistoj en la vasta Sovetunio sub komuna tegmento. Sovetiaj esperantistoj povis reciproki la opiniojn, spertojn kaj informojn pri agadoj ne nur porpacaj sed specife pri Esperanto kun multaj diversŝtatanoj, kio entute malfermis la fenestrojn de ambaŭ flankoj.

Surbaze de du enkondukaj prelegoj – unu de prof. Ivan Robert Fedoroviĉ (de Instituto de Ĝenerala Historio ĉe Scienca Akademio de Sovetunio) pri "Internaciaj problemoj kaj informadikaj fluoj" en Moskvo por eksterlandaj partoprenantoj kaj alia en Volgogrado por ĉiuj partoprenantoj de d-ro Imre Pethes (prez. de MEM) pri "Internacia Jaro de Paco" –, la renkontiĝo havis tri komunajn sesiojn por aŭskulti 31 raportojn de la reprezentantoj el ĉiuj partoprenantaj landaj sekcioj kaj de kelkaj sovetiaj reprezentantoj. Umeda Yosimi kontribuis kiel vicprezidanto de UEA per sia raporto pri spertoj en diversaj porpacaj aktivadoj, aparte substrekante pozitivan neŭtralecon, sur kies bazo ni distingu malbonon de bono, por eviti endanĝerigi la pacon kaj homan feliĉon, kio, laŭ multaj ĉeestintoj, kombiniĝis kun la renkontiĝa celo.

Ĉiumatene dum la renkontiĝo okazis vizitoj al urbaj vidindaĵoj, precipe kiel la urbo (tiutempe nomata Stalingrado), kie la sovetiaj armeoj renversis la germanajn faŝistajn armeojn.

La urbestro bonvenigis la partoprenantojn kaj faciligis ĉiujn necesajn aranĝojn pri loĝado, manĝado kaj transporto. Ĉiam la ses-aŭtobusan konvojon gvidis policeja patrolaŭto por sekura kaj rapida veturado tra la urbo.

Ne mankis distraĵoj vesperoj, en kiuj la ardaĵoj diskutitoj malstreĉiĝis helpe de profesinivelaj kantistoj, dancistoj, folkloraj ktp.

En la konkluda kunsido, la partoprenintoj unuanime akceptis la renkontiĝan alvokon, kiu deklaras i.a. subtenon al malarmado kaj apelacias al ĉiuj esperantistoj ankoraŭ pli aktive batali kontraŭ milita utiligo de la kosmo, kontraŭ la nuklea kaj ĉiu alia speco de vetarmado. La loka gazetaro ĉiutage raportis pri la renkontiĝo, sekvante la esencajn debatojn kaj finan alvokon.

Estis persona plezuro de la subskribinto konatiĝi kun sovetiaj esperantistoj dum la renkontiĝo, precipe pro tio, ke ili estas de junaj generacioj kaj fervoras kontakti kaj kunlabori en la internacia Esperantomovado. Ni certe ne povas preteratenti tiun grandan potencialon de junaj, novgeneraciaj samlingvanoj, kiuj pretas viĉigi en nia komuna laborado.

Umeda Yosimi

Germana DR, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Pollando, Rumanio, Usono kaj Vjetnamio kaj pli ol 200 reprezentantoj de Esperanto-klubo de 52 urboj el Sovetunio partoprenis Internacian Renkontiĝon de Esperantistoj por Paco kaj Malarmado en Volgogrado (Sovetunio) de la 8a ĝis la 12a de aprilo.



Kongresa Komunikilo

71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Pekino (Ĉinio)

26 julio – 2 aŭgusto 1986

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O.Kesto 825, Beijing, PR Ĉinio.

Kongresa temo: La traktadon de la kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo" reĝisoros s-ro Umeda Yosimi (Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio), kiun la interesitoj povas kontakti kun siaj ideoj kaj proponoj.

Inaŭguraj solenaĵoj: Komence de aprilo, en LKK-kunsido, kiun partoprenis ankaŭ reprezentantoj de UEA, estis decidite ne uzi por la inaŭguraj solenaĵoj la Popolan Halon (parlamentejo). Ĝia salonego povas samtempe sidigi dek mil homojn kaj sekve estas multe tro granda por UK. Tial la solenaĵoj okazos en la nova Ĉina Teatrejo. Tamen, la bankedo ja okazos en la Popola Halo.

Internacia Kongresa Universitato: La 39a sesio de IKU, kies rektoro estos prof. Ye Junjian, konsistos el dek prelegoj. Inter granda nombro da sinproponoj, elektiĝis kiel prelegontoj Chen Yuan, Chou Io kaj Li Shijun (Ĉinio), D. Deneva (Bulgario), Kawamura Sin'itirô (Japanio), L. Kordylewski (Pollando), E.J. Lieberman (Usono), J.M. Mabesoone (Brazilo), B. Popović (Jugoslavio) kaj V. Sadler (Nederlando). Plurajn aliajn altnivelajn proponojn oni akceptis kiel kontribuon aliloke en la kongresprogramo.

Artaj aranĝoj: LKK pretigas plurajn vesperajn artajn aranĝojn, en kiuj prezentiĝos tute novaj (ĉefe ĉinaj) geartistoj. Pro malbonaj spertoj kun la Interkona Vespero en multaj pasintaj kongresoj, LKK intencas aranĝi la Ĉinan Vesperon jam la unuan sabaton kaj poste plian folkloran vesperon kun la prezento de la fama spektaklo *Silka vojo*. Se inter tiuj, kiuj jam aliĝis al la kongreso, troviĝas kapablaj artistoj, kiuj ankoraŭ ne debutis sur kongresa scenejo aŭ malofte prezentiĝis sur ĝi, ili bv. kontakti la konstantan adreson (supre) por proponi sian kontribuon al la Arta Vespero.

Kongresaj tagoj: Ĉar la kongresanoj loĝos kaj manĝos ekster la kongresejo, la kongrestagoj devas strikte dividiĝi en tri partojn. Matena parto okazos inter 8h30 kaj 11h30 kaj posttagmeza inter 14h00 kaj 17h30. Vesperaj aranĝoj komenciĝos je 20h00. Ĉiuj kongresanoj devos samtempe havi manĝopaŭzon; sekve, neniuj programero povos okazi tiutempe.

Dumkongresaj ekskursoj: La tuttaga ekskurso al la Granda Muro okazos en merkredo, la 30an de julio. Oni notu, ke ĝi estas inkluzivita ne en la aliĝkoto de la kongreso sed en la turisma pakaĵo, kiun UEA peras. La duontagajn ekskursojn eblos partopreni antaŭ- kaj posttagmeze de sabato, lundo kaj ĵaŭdo (t.e. la 25a, 28a kaj 31a de julio) kaj posttagmeze de sabato, la 2a de aŭgusto.

Ĉina gimnastiko: LKK funkciigos senpagan kurson pri la tradicia gimnastiko tajĝiĉuano. Ĝi okazos matene en la hotelo Amikeco kaj gvidos ĝin Liu Ling.

Konversacia manlibro: Inter multaj eldonaĵoj, kies aperigon instigis la 71a UK, aparte interesa estas *Konversacia manlibro pri Universala Kongreso de Esperanto*. Ĉi tiu dulingva gvidilo celas unuavice ĉinojn, sed ĝi estas tre utila por ĉiuj esperantistoj. En dialoga formo ĝi enkondukas en plej diversajn situaciojn, kiujn oni renkontas en UK. Tial ĝi estas rekomendinda precipe por unuafojaj kongresanoj. La 202-paĝa manlibro haveblas ĉe la Libroservo de UEA por 8,10 gld. (sendokostoj aldoniĝas).

Horsistemo: Male al la informo en Dua Bulteno, komence de majo Ĉinio unuafoje enkondukis someran tempon. Do, la diferenco disde aliaj horsistemoj, aplikantaj someran tempon, restas sama kiel dum vintro.

Statistiko: Ĝis la 14a de majo enskribiĝis jam 2 031 kongresanoj. Tiu neatendita nombro kaŭzas gravajn problemojn al la kongresa administracio. Tial ĝi ne ĉiam kapablas sufiĉe rapide trakti petojn kaj mendojn kaj sekve petas komprenemon de la aliĝintoj.

Laste aperis...

Acta interlinguistica; 12a Scienca Interlingvistika Simpozio, red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1985. 187p. 20cm. Dek du traktaĵoj (1984) de Symoens, Verloren van Themaat, Janton, Ejsmont, Maxwell, Duc Goninaz, Rokicki, Lo Jacomo, Melnikov, Frank, Pstrusinska kaj Olde-Kalter. Prezo: 18,00 gld.

Angelo, Tirano de Padova; Aktoj unua kaj dua, (1835), Victor Hugo (1802-1885). El la franca trad. Daniel Luez (1924). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1986 (ne indikita). 48p. 21cm. Serio: Antologieto de la franca literaturo; Teatro; 19a Jarcento. Proza dramo pri oligarkio subpremanta la popolon. Prezo: 6,90 gld.

Ĉina-Esperanta vortaro. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 718p. 19cm. Bind. Vortaro kun pli ol 30 mil kapvortoj, aranĝitaj laŭ la ĉina latinlitera alfabeto (pinyin + tonindikiloj)

kun la ideografiaĵoj, ideografiaĵa indekso, esperantigitaj lokonomoj ks., prononctabelo, kronologia tabelo de Ĉinio kaj tabelo de kemiaj elementoj. Prezo: 48,00 gld.

Ĉu rakonti novele?, Johán Valano (pseŭd.). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1986. 144p. 21cm. Serio "Stafeto" n-ro 1. ISBN 90 71205 10 4. Dek unu krimaj enigmoj, solvotaj de Jano Karál, konata el aliaj "Ĉu"-titolaj libroj de la sama aŭtoro. Prezo: 21,00 gld.

English-Esperanto Dictionary (1921), F. Fulcher kaj B. Long. Londono: British Esperanto Association, 1985 (represo de 3a eld. de 1963). 332p. 19cm. Angla-Esperanta vortaro (kun notoj kaj listo de propraj nomoj), jam anstataŭita per pli modernaj kaj adekvataj. Prezo: 30,00 gld. (bind.); 24,00 gld. (broŝ.)

En novan mondon; Rektmetoda kurso por geknaboj; Gvidlibro, Vilma S. Eichholz (1926). Bailieboro (Kanado): Esperanto Press, 1986. 150p.+ folio. Ilus. Mimeo. 21cm. ISBN 0 919186 26 2. Divers-enhava ero en kurso por instrui Esperanton per kantoj, teatraĵoj, ludoj ks. al 12- ĝis 14-jaraj gejunuloj. Prezo: 33,30 gld.

En novan mondon; Rektmetoda kurso por geknaboj; Paroligiloj, Vilma S. Eichholz (1926). Bailieboro (Kanado): Esperanto Press, 1986. 78p. (nenumeritaj). Ilus. Mimeo. 21cm. ISBN 0 919186 28 9. Bildoj, kartoj, desegnaĵoj ks. kiel ero en kurso por instrui Esperanton al infanoj. Prezo: 33,30 gld.

Esperanto: Baza kurso, Audrey C.E. Childs-Mee. Roterdamo: Mondkomerca Eld. Esp-ista, 1985. 32+2p. Ilus. Mimeo. 21cm. Desegnaĵoj kun apudaj lokoj por enskriboj. Prezo: 7,80 gld.

Esperanto-katalogo de la libroj brajlaj, kiujn posedas la porblindulaj bibliotekoj en Nijmegen, Amsterdam kaj Den Haag [Hago]. Nijmegen: Le Sage ten Broek Bibliotheek, 1986 (ne indikita). 2+15p. 30cm. Nigrapresa katalogo en Esperanto. Prezo: 2,40 gld.

Esperanto-katalogo de la sonlibroj, kiujn posedas la porblindulaj bibliotekoj en Nijmegen kaj Den Haag [Hago]. Nijmegen: Le Sage ten Broek Bibliotheek, 1986 (ne indikita). 2+20p. 30cm. Nigrapresa katalogo en Esperanto. Prezo: 2,40 guldenoj.

Esperanto: Einführung in die internationale Sprache / Enkonduko en la Internacian Lingvon, R. Imbert k.a. Graz: Arbeitsgemeinschaft Österr. Esperanto-Lehrer / Internacia Kultura Servo, 1984. 65p. 21cm. Lernolibro por germanlingvaj komencantoj laŭ la "Zagreba Instrumetodo", surbaze de la 500 plej oftaj radikoj, kun i.a. ekzercoj kaj solvoj, dudirektaj vortlistoj kaj gramatikaj informoj. Prezo: 9,90 gld.


Internacia lingva komunikado en la eklezio kaj nuntempa mondo, Georgo Korytkowski. El la pola trad. Cz. Biedulski. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio/Eldon-Kleriga Centro Ritmo, 1986. 89p. 20cm. ISBN 83 7013 020 8. Traktaĵo pri internacia komunikado en la romkatolika eklezio, kun antaŭparoloj de M.D. Chenu kaj W. Miziolek. Prezo: 12,00 gld.

Kanzonoj, Volumo 3. Parizo: "La kancerkliniko", 1986. 31p. Ilus. Mimeo. 30cm. Kanzonoj de div. aŭtoroj, kun kelkaj muziknotoj. Prezo: 6,60 gld.

Kiel organizi internacian junularan kongreson (1972), red. Thomas Bormann kaj Jan Koszmaluk. Roterdamo: Komi-

siono pri Aktivula Trejnado de TEJO, 1986 (2a reviziita eld.). 32p. 21cm. "Broŝuroj por Esperanto-aktivuloj", n-ro 1. Utilaj konsiloj ankaŭ por aliaj renkontiĝoj. Prezo: 6,00 gld.

Konversacia manlibro pri Universala Kongreso de Esperanto, Zhu Mingyi (1936). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 202p. Ilus. 19cm. Dulingva: Esperanto-ĉina. Praktika informilo pri la historio, ĉefaj programeroj, proceduroj ks. de la fenomeno de Universala Kongreso, kaj specife pri tiu en Pekino. Prezo: 8,10 gld.



Mil jaroj de kristana filozofio, Evaldo Pauli. Florianópolis (Brazilo): Eld. Simpozio, 1985. 260p. 22cm. Studo pri la filozofiaj fundamentoj kaj historia evoluo de la antaŭsupozoj de la kristana ideologio, kun multaj koncizaj priskriboj de la ideoj de unuopaj pensuloj. Prezo: 36,90 gld.

Politika ekonomio de interlingvistiko; La: Du prelegoj (1980), Jonathan Pool (1942). Paderborn: Universität/GH Paderborn, Inst. für Kybernetik, 1986 (represo, ne indikita). 3+19p. Du referaĵoj el la 3a Int. Konf. pri Esperantologio: "Lingva egaleco, lingva malegaleco kaj lingva diskriminacio: Problemoj de konceptado kaj mezurado" kaj "La ekonomiaj avantaĝoj de planlingvo: Decidteoria perspektivo"; kun bibliografioj kaj tabeloj. Prezo: 8,40 gld.

Sferoj - 4; Sciencfikcio kaj fantasto, div. aŭtoroj. Pluraj tradukintoj el div. lingvoj. Komp. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: la kompilinto/Grupo Nifo, 1986 (ne indikita). 128p. Ilus. 19cm. ISBN 84 398 5753 5. Dek du sciencfikciaj rakontoj, kun la kutima bela prezento de la serio. Prezo: 18,00 gld.

Socialisma memmastrado; Evolutendencoj de la politika sistemo, Edvard Kardelj (1910-1979). El la serbokroata trad. Lucija Borčić. Beogrado/Sarajevo: Aktuelna Pitanja Socijalizma/Jugoslavia Esperanto-Ligo, 1986. 259p. 20cm. Traktaĵo de grava jugoslava marksista pensulo kaj teoriisto, kun glosaro. Prezo: 29,70 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Bulgario:** Aperis 16-paĝa turisma broŝuro: *Pri via feriado en Bulgario*. Ĝi estas plenkolora kaj donas utilajn informojn pri la lando kaj la tieaj turismaj eblecoj. Ĝi haveblas de Balkantourist, Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado, pl. Lenin, Sofia, Bulgario.

● **Aŭstrio:** Ankaŭ ĉi-jare (la 12an de aprilo) Aŭstria Esperantista Federacio (AEF) solenis la mortotagon de d-ro Zamenhof. Oni unue deponis florkronon antaŭ la Zamenhof-monumento en Borsa Parko. Cent aŭstraj esperantistoj – kun eksterlandanoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Italio – kolektiĝis en Pola Instituto en Vieno, kie i.a. Emil Vokal parolis pri "D-ro L. Zamenhof en Vieno" kaj d-ro Hans Maitzen pri "Ren-



● **Ĉinio:** En decembro pasintjare unuafoje diplomiĝis el Esperanto-Kolegio de Anhui 44 esperantistoj, kiuj alvenis el 22 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj urboj de Ĉinio. Ili studis Esperanton dum du jaroj en la kolegio kaj nun reiris al siaj hejmlukoj, kie ili agadas por la Internacia Lingvo.

konten al la Jubilea Jaro de Esperanto 1987". Krome okazis prezentado de lumbildoj pri Pollando, pianludado kaj kantoj, sekvitaj de koktela akcepto de la vicedirektoro de la instituto.

● **Hinda Unio:** La vickanceliero (estro) de Universitato de Lakno (Lucknow, ĉefurbo de la ŝtato Utorprodeŝo), d-ro S.N. Jha, inaŭguris la trian Esperanto-Kongreson de Bharato (Hinda Unio), kiu okazis de la 22a ĝis la 24a de marto. En la sesdekaj jaroj venis al Lakno d-ro A.N. Zubkov el Sovetunio por instrui la rusan lingvon ĉe la universitato. D-ro Zubkov allogis multajn junajn studentojn eklerni Esperanton. Sed, post la foriro de d-ro Zubkov, la studo de la lingvo ne plu daŭris. La kongresanoj diskutis preparojn por la Centjara Jubileo kaj decidis, ke Federacio Esperanto de Bharato (FEB) petu la registaron inkluzivi Esperanton en la oficialan studprogramon kaj rekoni ĝin kiel pontlingvon por internacia komunikado. El la nove elektita komitato de FEB: juĝisto kaj parlamentano Sankar Prasad Mitra (konsiliestro), K.V. Nath (prez.), d-roj Probal Daŝgupto kaj F.S. Abdul Salam (vicprez-oj), S.S. Pal (sek.), J.N. Sharma (kuna sek.). La kvara nacia kongreso okazos en Kalkato.

● **Italio:** Pli ol 160 homoj el 13 landoj partoprenis en la 10a Internacia Junulara Festivalo pri "Venecio kaj Mediteraneo", okazinta en Castelfranco Veneto de la 26a ĝis la 31a de marto. Por la jam tradicia renkontiĝo de Itala Esperantista Junularo ĉi-jare kunlaboris ankaŭ katalunoj kaj jugoslavo.

programoj estis koncertoj, teatraĵoj de la hungara trupo, filmoj, tuttaga ekskurso kaj katalun-jugoslava vespero.

● En marto d-ro Giordano Formizzi de Universitato de Verona parolis al 500 lernantoj de mezgrada lernejo en Udine pri "Esperanto: ĉu ebla lingvo por Eŭropo?" Poste 25 gelernantoj komencis nedevigan kurson de Esperanto. Oni filmis la renkontiĝon, kaj la filmo estos uzata en aliaj lernejoj. En la sama tago loka televidstacio elsendis 30-minutan programon pri Esperanto kun d-ro Formizzi, kaj loka radiostacio intervjuis lin dum 45 minutoj.

● **Japanio:** La 1-an de marto, vespere, la anglalingva programo "Angla horo" de NHK (Japana Elsend-Korporacio) dissendis tutlande 30-minutan radio-programon pri Esperanto, sub la titolo "Esperanto: universala lingvo", kiun pretigis BBC (Brita Elsend-Korporacio) kiel unu el interŝanĝaj programoj. La programon aŭskultas progresintaj studentoj de la angla. Aperis en la dissendo voĉoj de konataj esperantistoj kiel gesroj Markarian, d-ro John Wells k.a., krom britaj parlamentano kaj lingvisto, hungaraj lernejoj kaj ĵurnalistoj, kiuj favore komentariis pri Esperanto. Oni ripetis la saman dissendon en la sekva vespero.


● TV Asahi, privat-entreprena televidstacio en Tokio, kun tutlanda dissenda reto, kunmetis tri-minutan prezenton (ne mallongan laŭ sia speco) pri "Esperanto, mistera lingvo. Kien ĝi iras?" en la kadro de la populara vendredvespera programo "Novaĵstacio",



ČEDOK

prezentas al vi
Čeĥoslovakion








● **Ĉeĥoslovakio:** Aperis kolora faldprospekto 14-paĝa de la ĉeĥoslovaka vojaĝoficejo: *Čedok prezentas al vi Ĉeĥoslovakion*. Ĝi informas pri la historio, geografio, vidindaĵoj, naturkondiĉoj ks. kun plenkoloraj fotoj. La prospekto haveblas senpage de: Čedok, Esperanto-centro, Na příkopě 18, CS-111 35 Praha, Ĉeĥoslovakio.

la 7an de marto. (La komentariisto fanfaronis, ke tiun programon ĝenerale rigardas 50 milionoj da japanoj.) Temis pri la lingvo Esperanto, kiu – tre vaste konata iam postmilite – ne multe aŭdiĝas nuntempe, kaj la kameroj esploris kiel ĝi statis en la lasta dudeko da jaroj post la UK en Tokio (1965), koncize prezentante scenojn en librovendejo, serĉante Esperantajn librojn, surstratajn demandojn, unu el la japanaj universitatoj, kie Esperanto estas oficiale instruata kaj montrante kiel Esperanto sonas per mal-longaj dialogoj.

● **Nederlando:** La 22an de aprilo en Hago la eldonejo Prisma prezentis por la gazetaro la novan eldonon de la dudi-rekta Esperanto-nederlanda vortaro de s-ro Adriana J. Middelkoop. La unua ekzemplero de la vortaro estis prezentita al s-ro D.A.Th. van Ooijen, prezidanto de la Konstanta Komitato por Edukado kaj Sciencoj de la nederlanda parlamento. Poste okazis informoj pri la kontribuo de Nederlanda Esperanto-Federacio kaj Esperanto-Centro Nederlando al la aperigo de la vortaro kaj prelego de ing. J.O. de Kat pri la plej lastaj evoluoj en la komputila uzado de Esperanto.

Fake

● **Afrika agado:** En Salvador (Brazilo) Esperanta Studgrupo Zamenhof aktive kunlaboras en la afrika agado de UEA per korespondado kaj sendado de



● **Britio:** Jen foto pri unutaga kurso – ne nur de Esperanto, sed ankaŭ kiel uzi ĝin – kiu okazis en Bangor la 8an de marto, organizita de Esperanto-Federacio de Kimrio. Inter la kvardek kursanoj troviĝis proksimume dudek gejunuloj. Maldekstre estas Hilary Chapman, unu el la gvidintoj.

didaktikaj materialoj, libroj, vortaroj ks. al Gambio, Kongo, Ebura Bordo kaj Togo. Pri tio aperis ampleksa intervjuo en la ĵurnalo *Jornal Afrobrasil* de Salvador (4-10 dec.).

● **Cseh-seminarioj:** Ĉi-jaraj Cseh-seminarioj okazos en La Chaux-de-Fonds, Svislando (7-12 julio), Pekino (26 julio – 2 aŭg.), Bydgoszcz, Pollando (4-16 aŭg.) kaj Międzygórze, Pollando (18-30 aŭg.). Ĉiun seminarion akompanos kurso por komencantoj laŭ la Cseh-metodo, krome la du seminarioj en Pollando inkluzivas seminarion por tiuj, kiuj jam posedas atestilon de enkonduka seminario pri la Cseh-metodo. Pliaj informoj estas haveblaj de Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

● **Eldonado:** Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) entreprenas kontroladon de manuskriptoj. La kontrolo rajtigos aperigi la frazon "Lingve kontrolita de EVA". La kontrolkomisiono funkcios sub la gvido de akademiano Reto Rossetti. Laŭinforme oni pagos por la laboro laŭ du tarifoj, depende de la vivnivelo de la lando de la origino de la manuskripto. Estos interese vidi, ĉu iu pretos pagi por tiu servo. Interesitoj povas turni sin al la Kontrolkomisiono de EVA, s-ro Reto Rossetti, 2 Elmwood Crescent, Luton, LU2 7HX, Britio.

● **Gazetoj:** La gazeto *La espero el Koreujo* ĉi-jare ekzistas jam dek jarojn. Tiu atingo de la dua kolora Esperanto-gazeto estas elkore gratulinda kaj montras ankaŭ al aliaj landoj, ke tio eblas,

des pli ke Korea Respubliko ankoraŭ ne estas inter la plej riĉaj landoj de la mondo. UEA aparte dankas la eldonantojn de *La espero el Koreujo* nome de afrikaj esperantistoj pro tio, ke ili akceptis centojn da donac-abonoj al Afriko; fakte la tuta afrika abonantaro de *Kontakt* jam de kelkaj jaroj senpage ricevas la koloran gazeton el Korea Respubliko.

● **Paco:** La Esperanto-grupo en Halle (Leninallee 34, DDR-4020 Halle, Germana DR) petas kolorajn bildkartojn pri multaj landoj ĝis la 1-a de septembro (Internacia Tago de la Paco). Ili estos uzataj en ekspozicio okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto. Oni respondos al ĉiuj sendaĵoj.

● De la 24a ĝis la 27a de aprilo en Sofio okazis grava sesio de Monda Packonsilio (MPK). Ĝi elektis novajn gvidorganojn de MPK kaj ellaboris novajn formojn kaj metodojn de agado favore al la konservo de la monda paco kaj malebligo de nukleraketa katastrofo. En la laboro de la sesio aktive partoprenis delegitaro de Mondpaca Esperantista Movado (MEM): D-ro Imre Pethes (prezidanto), Nikola Aleksiev (hon. prez.), Vasja Cvetkova (sek.), la lasta kiel observanto. Ili informis pri la agado de la monda esperantistaro en spirito de paco kaj interkompreniĝo de la popoloj kaj ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj kaj pri la Centjara Jubileo de Esperanto. La sesianoj estis alvokitaj al komuna festado de tiu jubileo en la sekva jaro. Estis esprimita favora rilato al la Internacia Lingvo kaj ĝiaj celoj. Dum la sesio estis denove reelektita kiel membro de MPK d-ro Imre Pethes (prez. de MEM), Clément Tholet (ĝen. sek. de MEM) kaj William Gilbert (vicprez. de MEM).

● **Scienc-fikcio:** En n-ro 1/1986 de la finna scienc-fikcia gazeto *Ikaros* aperis en finna traduko de Pekka Virtanen la Esperanta novelo *La subtera elizeo* de Konisi Gaku, origine publikigita en *La revuo orienta* (1984) kaj poste en la kolekto *Vage tra la dimensioj* (1976).

Persone

● **Blanke:** Laŭ komuna invito de la universitatoj de Helsinko, Tampere kaj Turku kaj Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, d-ro Detlev Blanke (Germana DR) faris de la 8a ĝis la 22a de

marto dek gastprelegojn pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj en la menciitaj urboj kaj en Lahti.


● Sur paĝo 44 de la marta numero de *Esperanto* aperis la programo de internacia simpozio pri "Socilingvistikaj aspektoj de la Internacia Lingvo", okazonta en Tokio. La titolo de la prelego de d-ro Detlev Blanke devus teksti: "Socipolitikaj influoj kaj la Internacia Lingvo – Ĉu socisistemaj kaj politikaj diferencoj reflektiĝas en Esperanto aŭ kreas lingvovariantojn?"

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bonvolu vidi la duan kovrilan paĝon.

Gastoj kaj salutoj estos bonvenaj ĉe la solena kunveno (28-29 junio) okaze de la 80-jariĝo de la loka Esperanto-movado en Debrecen. Bv. skribi al: Departementa Komitato Hajdú-Bihar de HEA, Debrecen, Pf. 61, H-4010 Debrecen, Hungario.

Wang Xigen elkore dankas ges-rojn L. Lentaigne kaj s-rojn E. Companys



(Francio), G. Pirlot (Belgio), Kakuo Masao (Japanio) kaj Yu Goujian (Ĉinio) pro ilia multa helpo. Mi fidele esperantistiĝis kaj nun profesie instruas nian lingvon en Esperanto-Kolegio de Anhui kaj Radio Anhui.

Diversnaciajn muzikilojn ni montros fine de 1986 en ekspozicio "Internacie kolektata". Ĉiu, kiu sendos iun ajn

nacian muzikilon, ricevos de ni samvaloraĵon. Informojn donas s-ro Maik Jung, Albert Schweitzer Str. 6, DDR-2000 Neubrandenburg, Germana DR.

Kokojn interŝanĝas aŭ aĉetas s-ro Guiot, 38 route Blainville, F-54110 Dombasle, Francio.


Deziras korespondi inĝeniero, komentanto (23-jara), pri klasika literaturo, kuirado kaj la historio de antikvaj civilizoj kaj aŭtoj s-ro Oleg A. Demjašev, Nova Urbo, 4/08-127, SU-423819 Brežnev, Tatario, Sovetunio.

Universala Ligo atentigas la publikon, ke sole ĝi estas la rajthavanto kun decidpovo kaj kompetento pri la kurzo de la stelo. Sekve, ĉi-rilata anonceto en la marta numero de *Esperanto* (p.60) donas malĝustajn informojn. Universala Ligo, Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM Soest, Nederlando.

Prof. Gaston Waringhien havas novan adreson: 20 Avenue d'Ivry, Tour Tokyo – App. 2215, F-75645 Paris Cedex 13, Francio. Tel. (1) 45 85 57 80.

Serĉas gitaron aŭ akordionon juna zairano, kiu verkas kaj registras Esperantajn kantojn. Kiu povas helpi? S-ro Mayoma Diankembo, B.P. 152, Kinsasa 7, Zairo.

Pri vojaĝado, lingvoj, psikologio deziras korespondi f-ino Jaroslava Náhlíková (estro de vojaĝoficejo), Tržní 1153, CS-38601 Strakonice I, Ĉeĥoslovakio.



Deziras korespondi s-ro Makumbi Kana, Laboratoire Ciza, B.P. 50, Lukala (Bas-Zaïre), Zairo.

Sur la bordo de Nevil Shute haveblas de UEA kontraŭ 21 gld. kun la favora rabato de 1/3 por min. tri ekzempleroj (plus sendokostoj). Havenda por ĉiu pacamanto.

Kun bahaaninoj 30- ĝis 40-jaraj deziras korespondi John Dale, P.O. Box 4262, Hyattsville, MD 20787, Usono.

Se filologio vin interesas, aliĝu al IUEF. La jarkotizo inkluzivas ricevon de *Filologo* (trifoje jare). Pagu 7,00 gld., indikante jaron, al R. Moerbeek, Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando. Poŝtĝirkonto 1156545; aŭ UEA-kodo robm-b.

Nekrologo

GIUSEPPE CASAGRANDE (1907-1986), instruisto, mortis la 27an de februaro en Pianoro (Bologna), Italio. Li aliĝis al UEA en 1948 kaj agadis por Esperanto precipe per instruado. Lia lasta strebo estis la fondo de Porpaca Mondharmoniiĝa Instituto.

WALTER LIPPMANN (1895-1986), juristo, mortis la 5an de aprilo en Hamburgo, FR Germanio. Li okupiĝis pri multspeca informlaboro ekde 1908: instruado, prelegoj kaj societa agado. Li fariĝis ano de Lingva Komitato (1923) kaj poste dufoje estis la direktoro de la gramatika sekcio de Akademio de Esperanto (1924-36 kaj 1951-65). De li aperis multaj artikoloj, precipe gramatikaj kaj literaturaj en la Esperanto-gaze-

taro. Li kontrolis multajn valorajn manuskriptojn kaj tradukis literaturaĵojn, i.a. *Lingvaj respondoj* de Zamenhof en la germanan (1921): *Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten*, kiu reaperis en 1984. Walter Lippmann estis unu el la lastaj renomaj esperantistoj el la unuaj jardekoj de la lingvo.

MAURICE MOINDROT (1913-1986), terkulturisto, forpasis la 20an de februaro. Li estis la delegito por Les Aix d'Angillon jam de tuj post la Dua Mondmilito.

ANNA WIECKA-VAHEN (1915-1986) mortis la 8an de januaro en Gdynia (Pollando), en kies regiono ŝi multjare aktivis i.a. per instruado.

Perkomputila tekstoprilaboro



Scienca Eldona Centro

Aperis ĵus la plej ampleksa projekto de Scienca Eldona Centro: 336-paĝa libro pri tekstoprilaboro komputila. Ĝi prezentas 21 studojn pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro, verkitaj de eminentaj fakuloj el Ĉinio (Ouyang), Francio (Janot-Giorgetti k.a.), FR Germanio (Maas), Germana DR (Meier k.a.), Hispanio (de Sopeña), Hungario (Gordos k.a.), Japanio (Niŝida), Nederlando (Witkam, de Kat), Pollando (Jassem k.a.) kaj Usono (Sherwood). La artikoloj estas ordigitaj laŭ kvar sekcioj: Parol-prilaboro, Aŭtomata lingvo-analizo, Perkomputila tradukado kaj Komunikado inter homo kaj maŝino.

Perkomputila tekstoprilaboro, redaktis Ilona Koutny. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 336p. 22cm. Ilus. ISBN 963 571 147 6. Kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj pri la aŭtoroj kaj 10 paĝoj de resumoj en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld. plus sendokostoj. Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.

Inter pli ol 2 700 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara

fama romano de famaj aŭtoroj kaj tradukinto

"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo..." (Régulo Pérez)


"La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La faraono'." (Vatré)

Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. P. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!

6a libro en la ĉu-serio!

Ĉu rakonti novele?

de
**Johán
Valano**



Jano Karál, nia obstina konato el la aliaj rakontoj, plian fojon solvas dum atentostreĉaj aventuroj aron da krimaj enigmoj en la plej nova novelaro de Johán Valano.


Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Prezo 370 BEF (por Belgio + 6% AVI) + afranko, aŭ ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo 21,00 gld + sendokostoj. 144 paĝoj. 21 x 14,8 cm. ISBN 90-71205-10-X.

POR INTERNACIA JARO DE LA PACO: ESPERANTAJ LIBROJ PRI PACO

Temas pri speciale malaltaj prezoj, kiuj validos ĝis la forvendo de nia nuna stoko...

Vilaĝoj en batalkampo 2,70; *En la nubon ŝi sorbiĝis* for 3,30; *Danjo en Vjetnamio* 4,50; *Flustr' el uragano* 7,50; *Hirosima-Nagasaki* (bilda dokumento) 145,00; *Hibakusha* 3,60; *Infanoj de Hiroŝimo* 5,40; *Akvon mi petas* 6,60; *Nudpieda Gen* 30,00; *Memuaro pri flamoj* 9,90; *Vulpoj de Ĉironnup* 18,90; *Pupo fariĝis cigno* 9,90 guldenoj.

Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Plus sendokostoj. Rabato de unu sesono por mendo de minimume tri ekzempleroj.




Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio traktas ★ la radikojn de diskriminacio ★ diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj ★ internacian ekonomian diskriminacion ★ diskriminacion kontraŭ virinoj ★ diskriminacion pro seksa orientiĝo ★ diskriminacion pro religio ★ maldiskriminacion kaj ★ lingvan diskriminacion.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld.



Koresponda
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121bis,
BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

La monde ŝatata fabela rakonto, kolore
ilustrita kaj bindita, gajninto de la premio:

Infanlibro de la Jaro 1985:

La eta princo

Verkita kaj desegnita de

Antoine de Saint-Exupéry (1900-1944)


Dua, reviziita Esperanta traduko el la franca
de Pierre Delaire (1918-1985).

Eld. Kanada Esperanto-Asocio. Montrealo, 1984. 93p. 23cm. ISBN 0 15 246503 0.

Mendu de la Libroservo de KEA, 6358 de Bordeaux, Montréal, QC. H2G 2R8. Tel.
(514) 495-8442. Prezo: \$14,00 inkl. de la sendokostoj. Specialaj prezoj por grandaj
mendoj. Mendebla ankaŭ de la Libroservo de UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015
BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo: 30,00 gld.

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita
mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTER-
NACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road,
Poole, BH17 7LN, Britujo.



PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

invitas vin al Zagreb, Jugoslavio

23-27 aŭgusto 1986

En Esperanto prezentas profesiaj teatroj el Britio,
Francio, FR Germanio, Italio, Pollando kaj Rumanio.

Aliĝkotizo: 20 nederlandaj guldenoj (inkluzivas
biletojn por 10 prezentadoj).

Loĝado: En privataj ĉambroj kontraŭ 20 gulde-
noj nokte.

Informas: Internacia Kultura Servo
Amruševa 5
YU-41000 Zagreb, Jugoslavio;
☎ (041) 424 660



COLLEGE INTERNATIONAL DES MELEZES CRANS S.A.

International high school

(Internacia mezlernejo)

C.P. 51, CH-3963 Crans-sur-Sierre, SVISLANDO

Esperanto-kursoj dum kutimaj studhoroj laŭ deziro

Preparo al antaŭ-universitataj ekzamenoj por ekde 15-jaraj gejunu-
loj en belega montara regiono, sur sunplena sekura alt-ebenaĵo
(1 500m / 4 500ft).

Ni intencas formi estontajn estrojn, kiuj povos perfekte paroli la francan kaj anglan lingvojn
kun laŭvole bonega kono de Esperanto.

La gejunuloj krome lernos perkomputilajn sciencojn kaj uzos modernajn komunikilojn:
gazetaron, aŭd-vidajn rimedojn kaj teknikojn ktp.

La semajnfinoj kaj la posttagmezoj estos okupitaj de konferencoj, marŝadoj, sportoj (skiado
eĉ somere, naĝado, golfoludo, teniso,...).

La internuleja sumo, entenanta ĉion, estas po 27 000 svisaj frankoj jare.

*Pliaj informoj haveblaj skribe de: S-ro A. Piérard, psiko-pedagogo, CIM, CP 51, CH-3963
Crans-sur-Sierre, Svislando.*